

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Unuaj paŝoj
en Oceanio**



**Lingvo kaj
flug-sekureco**



**Ĉu esperantistoj
en Nord-Koreio?**



Pettyn: 40 jaroj da radio

Vi trovos

121 **Malferme**

Ne kontraŭ, sed kun kaj per

István Ertl

122 **RADIO EN RETA PERSPEKTIVO**

*Intervjuo kun
Andrzej Pettyn*



124 **Oceano**

Samoaj semoj multigendaj

Laŭ raporto de Paul Desailly

125 **Azio**

**Tagiĝo en la lando
de kvieta mateno**

LEE Chong-Yeong

Eŭropo

Proksime al Eŭropa Unio

Laŭ Ivo Durwael kaj Umberto Broccatelli

126 **Faka aplikado**

Kiam nia lingvo vere pontas

Claude Bodson

126 **Esperanto por via flug-sekuro**

Kent Jones, Gilbert Ledon

127 **Instruado**

Viglas sepdek-jara Instituto

Atilio Orellana Rojas

128 **Reagoj**

129 **Navige tra TTT-paĝoj**

130 **Kalendaro 2000-2001**

132 **Recenzoj**

*Ziko Marcus Sikosek pri
Esperanto. Das neue Latin der Kirche*

*Sylvan Zaft pri
Everyone's own language*

*YAMASAKI Seikô pri
Kio estas demokratio?*

*Mauro Nervi pri
Lando malekzista*

*Jorge Camacho pri
Lingvo intermonda*



135 **Laste aperis**

Kaj plue...

136 **Influe**

137 **Loke - Persone**

138 **Fake Oficiala Informilo**

139 **Foliume**

140 **Forpasoj**

La kovrilo:

Andrzej Pettyn
(komplezo de
A. Pettyn)

Dekstre: Ruinoj en
Cipro (M. Vermaas)

ESPERANTO

*Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)*

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Grafiko: Francisco L. Veuthey.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 68,32; USD 34; DEM 59; JPY 3900 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas € 3,00.

Anoncarifto (eŭroj): 1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).
Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: +31-10-436-1044.
Telefakso: +31-10-436-1751.
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.
TTT: <http://www.uea.org>
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.
Direktoro de la Centra Oficejo: Pasquale Zapelli.



NE KONTRAŬ, SED KUN KAJ PER

Drastaj ŝanĝoj klimataj, senhelpaj malsato kaj mizero, brutala poluo de vivejoj, armilaj konfliktoj sen ĉeso kaj fino, tutmondiĝo ekonomia sen responsa kultura konsciigo pri la interdependo de ni ĉiuj...

Longe oni povus listigi la misagojn, plagojn kaj sortofrapojn kies regurdo en la televidaj novaĵoj ĉiuvespere jam lasas nian cerbon obtuze senreaga. Kaj, sendube, oni ankaŭ povus apudmeti la korvarmigajn atingojn de la scienco biologia kaj medicina, la progresojn de komputiko Interreten, aŭ la kreskantan regionan kunlaboremonton en Latinameriko aŭ Eŭropa Unio... Tio kian bilancon oni starigas je la jarmila sojlo el la homaraj pozitivaj kaj negativaj — kies tuton neniuj homa intelekto unuope ampleksas — forte dependas de la momenta stato de la bilancfara spirito.


Tamen, en kampo kiu nin rekte koncernas, tiu de la lingvaj diverseco kaj demokratio, la evoluoj malmulte pravigas optimismon. Kiel vi povis legi en faktoriĉaj artikoloj pasintnumere (pp. 102-103), lingvoj tutmonde formortas laŭ senprecedenca skalo, ĉar la trudoj de la ĉiutaga vividevo favoras lingvojn ekonomiportajn, sen kompato al la kultura riĉo kaj identecbunto de la malfortula lingvokohorto. Samkiala gravito ĉirkaŭ kelkaj lingvoj potencaj igas ke, eĉ kiam en iuj forumoj lingvoj estas laŭdeklare egalaj, kelkaj funkcias pli egalaj ol la aliaj.

Kompreneble ankaŭ ĉi-terene kontraŭmetebblas multo pozitiva. Lingvoj kiuj proksimis forvelkon — la eŭska, la kimra, la frisa — ricevis en la lasta tempo novajn fortojn en medio demokratia, ĉar popola subteno ŝanĝis la publikan percepton pri ilia gardindeco. Interreto ebligas, per malgranda investo financa, multiĝon de uz-okazoj por ĉi tiuj lingvoj vivintaj en ombro.

La kultura movado de esperantistoj ĉiam poris, kun la margena escepto de siaj unuecige universalismaj franĝoj, la flegon de kulturaj agadoj plej diversaj, riveretoj kiuj interfluu en la mareton de la tutmonda kulturo Esperanta. La esenco de tiu nia kultura laborado ja situas en la perado, pontado, transdonado kaj intergastigo de ĉio kion produktas niaj riĉigaj apartecoj.

La nuna mondo ofte komunikas, bone aŭ malbone, pli ofte fuŝe ol efike, en la angla lingvo, kaj iom malpli en aliaj ĉeflingvoj. Estus donkiĥotece postuli, de unu tago al alia, tiun komunikan rolon por Esperanto. Sed estas ja realisme, nun kiam ni ekserĉas daŭrigajn agliniojn por nia Kampanjo 2000, montri kunagige, je ĉiu ebla okazo, la efektivan funkciadon de nia unika perilo, kiu neniam rolu kiel kontraŭulo, sed ĉiam pli kiel aliancano en la solidarecaj streboj por iom pli bonfartigi nian ŝanceliĝan mondon.

István Ertl



Andrzej Pettyn: "Ni devus pli kura

Andrzej Pettyn, unu el la plej konataj "voĉoj verdaj", ĉu jam emerita? Ni intervjuis la 62-jarulon, kies kontribuojn tamen eĉ nun ne devas malhavi aŭskultantoj de la polaj E-elsendoj.

■ Ekde 1959 vi laboris ĉe Pola Radio. Pri kiu el la atingoj de viaj kvar Esperantaj jardekoj vi plej fieras?


Mi estas aparte fiera pri komuna redakcia sukceso: la tutmondigo de la elsendoj per ret-radio. La iama revo, pri kiu antaŭ pli ol 30 jaroj mi informis en aprila ŝercotago, fariĝis fakto, kaj ĝi nomiĝas Real Audio. Persone mi fieras ke la ekzisto de la Esperanta Redakcio stabiĝis parte pro mia kontribuo. Aparte grava redaktora atingo estas la tradiciigo de telefonaj "son-raportoj" pri Universalaj Kongresoj, kies serion mi lanĉis en Brajtono (1989). Tio kaŭzas ke precipe en UK-periodo oni aŭskultas Polan Radion ĉiutage, ĉar samtage oni ekscias kio interesa okazas en la kongresejo.

■ Kiuj viaj planoj en tiuj 40 jaroj ne realiĝis?

Multaj. Ekzemple, mi bedaŭras ke mi ne sukcesis eldoni antologion de elektitaj literaturaj elsendoj de Pola Radio. Eĉ pli mi bedaŭras ke mi ne sukcesis aperigi en la formo de vortaro la ampleksan materialon pri E-prepozicioj kiun mi kolektis dum multaj jaroj, ĉiusemajne tradukante literaturaĵojn. Sed ĝi jam estas duonpreta sur sliparo, kaj se mi trovos eldoniston, mi verŝajne aperigos ĝin.

■ Ĉu ni konkludu ke vi povos nun okupiĝi pri aferoj por kiuj mankis tempo antaŭe? Kiajn planojn vi havas?

Mi volus fini la pretigadon de kelkaj instrumaterialoj por polaj nevidantoj, kun kiuj mi kunlaboras de multaj jaroj. Sekve mi planas skribi memorlibron pri mia laboro en Pola Radio (pri elektitaj okazaĵoj, "aventuroj", homoj, kontaktoj kaj kunlaboro kun aŭskultantoj kaj e-istaj organizaĵoj). Mi esperas ke mi trovos eldoniston por



reaperigi (post kompletigoj kaj plibonigoj) mian ekzerco-kajeron *La Esperanto-fonetiko en praktiko* paralele kun specimenaj registraĵoj en la formo de kasedoj aŭ kompaktaj diskoj. Krome, en la pola lingvo mi ĵus finis pli ol 400-paĝan libron dediĉitan al mia loĝurbo Milanówek, "Kiam Milanówek estis la ĉefurbo de Pollando. . .", kaj la

Kelkaj verkoj de Andrzej Pettyn

Vizito de prezidento. Jerzy Zawieyski. Trad. A. Pettyn. 1984. 36p. Infanlibro. € 2,40.

Esperanto en funkcioj. 1988. 182p. Progresiga lernolibro. € 4,20.

100 pri cent. 1989. 46p. Anekdotoj pri famuloj. € 2,70.

Esperanto en dialogoj. 1990. 418p. Lingvoekzercoj. € 9,90.

La Esperanto-fonetiko en praktiko. Elektitaj parolsonoj kune kun praktikaj ekzercoj. 1993. Libreto kun kasedoj (120 min.). € 19,20.

Laŭtemaj Esperanto-konversacioj por progresantoj. 1993. 4 kasedoj (225 min.). € 30,00.

Ĉu vi volas paroli flue? 1994. 18p. Konsiloj por memlernantoj. € 2,40.

Esperanto laŭ amuz-metodo. 1996. Distra legolibro kun paroligaj ekzercoj. Kasedo (60 min.). € 12,30.

Eŭro-humuro kaj... sekso. 1996. 2 libroj + 4 kasedoj. malprudaj ŝercoj. € 38,40.

Ĉu vi parolas Esperante? 1999. 96p. Kurso por hejma studo, kun kompaktdiskoj. € 31,50. Nur libro: € 8,10.



Meze de la 1980-aj jaroj: Andrzej Pettyn donas klarigon al la stabo.

duan volumon de samampleksa verko, "Granda libro de anekdotoj". Kun la eldonejo KLEKS kaj ties posedanto Georgo Handzlik mi planas aperigon de anekdot-kolekto el ambaŭ volumoj en Esperanta traduko, tre verŝajne kun didaktikaj ekzercoj, por uzo en konversaciaj studrondoj.

■ Dum vi teksas tiujn "emeritajn" planojn, via voĉo tamen aŭdiĝas en Pola Radio. Kiel vi plu kunlaboras?

Se mia krurmalsano ne ĝenas min, mi vizitas Polan Radion du fojojn semajne kaj redaktas la ĉiusemajnan "kulturmagazinon", partoprenas en leterkestoj kaj redaktoraj interparoloj pri diversaj temoj, kaj tradukas tion kion oni bezonas en la koncerna tago.

■ Kiaj ideoj pri radiolaboro venas al vi nuntempe en la ŝanĝiĝanta mondo?

La novaj teknikaj inventaĵoj, tute speciale la reto, malfermas al la esperantistaro novan perspektivon de interesa

agado. Laŭ mi oni devus pli kuraĝe kunlabori kun lokaj radiostacioj por prezenti nacilingvajn radioelsendojn pri lingvaj problemoj, ties ebla solvo ktp. La elsendojn oni povas pliriĉigi: per son-materialoj de diversaj radiostacioj troveblaj en la ret-arkivejoj, per ĉiam pli ofte aperigataj E-kantoj ktp. La kombino de "internaciaj" radioelsendoj (ekz. la pola, ĉina, aŭstra, vatikana, itala) kun la "lokaj" per la utiligo de la reto povus konsiderinde kontribui al la informado kaj vastigo de la praktika aplikado de Esperanto.

■ Per kio la Esperanta radio specife kontribuas al la evoluo de niaj komunumo kaj lingvo?

Per la rapida perado de E-movadaj informoj, kuraĝigado de lokaj agantoj per la prezento de imitindaj iniciatoj, instigado al pli energia agado favore por Esperanto, kontribuado al korekta lingvouzo kaj unuecigo de prononcado. Krome ĝi kompreneble montras la vivantecon de la lingvo al eksteruloj.

■ Dum "ĉiuj" aŭskultas la E-elsendojn de Varsovio, la pola movado mem jam jardekon relative malfortas. Kiel vi vidas ĝian situacion?

"Kulpas" pri la malfortiĝo la sociaj-politikaj transformoj en Pollando post 1989, kiuj aliflanke — ni ne forgesu tion — donis al ni liberecon. La idealismo ĉe multaj personoj flankeniĝis, kiam aperis ebloj de mongajno. La plej talentaj gvidantoj kaj organizantoj, plejparte junaj aŭ mezaĝaj, tuj rimarkis ke la malfermiĝo de la landlimoj kaj la liberaliĝo de la vivo donis al ili ŝancon akiri bonan profesian pozicion, gajni monon. Do ili plejparte koncentriĝis al profitdonaj okupoj, kaj kvankam multaj el ili ne forgesis la Esperantomovadon, tamen por kelka tempo ili rezignis pri la aktiva partopreno.

Intertempe kapitalismo ekregis ĉe ni ĉie. Ne plu oni ricevas subvenciojn, ne plu senpagajn kunveneojn. Por ĉio oni devas mem pagi. Terure kreskis la kostoj de afranko kaj de eldonaĵ-produktado: tial ĉesis aperi *Pola Esperantisto*, ne plu grandkvante aperas novaj libroj. La membraro de Pola E-Asocio komencis draste ŝrumpi kaj samtempe maljuniĝi, ĉar junuloj ĉesis viziti klubajn kunvenojn, en kiuj ili trovis por si nenion interesan. Ili povas nun libere vojaĝi tra la mondo, do ili komencis lerni la anglan, kiun ili pli ofte bezonas.

Samtempe, rezulte de kapitalism-tendencaj ekonomiaj ŝanĝoj kaj de ŝoka valor-malgrandiĝo de la emerituroj kaj pensioj, sekvis malriĉiĝo de la socio. Unuflanke oni povas libere vojaĝi (la pasportojn ĉiu tenas finfine hejme), sed aliflanke oni ne havas monon por vojaĝbiletoj kaj por partopren-kotizoj de E-aranĝoj. En tiuj polaj urboj kie minimume unu esperantisto estas vigliga motoro, la loka movado plu ekzistas, kvankam tre ofte ĝi vegetas, ĉar ne okazas kursoj kaj ĝenerale mankas ideoj pri tio kion fari en tia situacio. Mi kredas ke tiuj junaj kaj mezaĝaj esperantistoj kiuj akiris bonan pozicion en la vivo, iam revenos. Sed kiam? Mi ne scias. Tial bonvena estas tiu agado kiun oni disvolvas diversloke en ne ĉiam bonaj kondiĉoj por "transvivi" kaj konservi la kontinuecon. ★

Samoaj semoj multigendaj

Kiel sendito de la lastatempe fondita UEA-komisiono pri agado en Oceania, Paul J. Desailly energie "semis" en Samoo.

La 48-jara bahaano Paul J. Desailly estas konata al multaj e-istoj ĉefe en Ĉinio kaj Vjetnamio kiel instruisto de la angla kaj Esperanto. Li aŭtoris la anglalingvan libron "Realigi la mondan pacon: la baha kreda kaj Esperanto", kies E-versio jam pretas manuskripte kaj estis favore komentita de pluraj legintoj, i.a. Trevor Steele.

kaŭ 60 kilogramojn da, ĉefe, Esperanto-lerniloj.

**Dekstre:
Lernantoj de
Samoa Kolegio.
Sube: La muzike-
maj kursanoj el
Pago Pago,
Usona Samoo.**



La baha reto

La 7-an de aprilo li forflugis el sia hejmurbo Melburno al neordinara misio: lia tasko estis informi pri Esperanto kaj laŭeble instrui ĝin en la pacifika reĝlando Okcidenta Samoo, kies monarko estas lia samreligiano. (Parto de la Samoa insularo apartenas al Usono.) Bahaano estas ankaŭ la sola



Ambaŭ fotoj kompleze de Paul Desailly

samoaj UEA-membro, Marco Kappenberger, kiu vivas en la ĉefurbo Apia. Desailly povis do apogi sin sur kontaktoj bahaaj, sed ankaŭ "familiaj", ĉar ekz. la loka Alta Komisiito de Aŭstralio estas kuzo de esperantista amiko de Desailly.

Bona aŭguro: en Nov-Zelando, kie la Aŭklanda delegito, bahaano Bradley MacDonald, helpis al la vojaĝanto, prosperis senpage en-aviadiligi pres-

Alveninte al Samoo, Desailly tuj ekteksis kontaktaron en la spirita kaj intelekta elito.

Okaze de vizito de la sveda ambasadoro (rezidanta en Kanbero) al baha ceremonio en Apia, Desailly estis petita fari paroladon pri la ligoj inter bahaismo, Esperanto kaj la monda paco. Alia parolado pri Zamenhof ĉe lokaj rotarianoj, la 2-an de majo, varbis lian unuan samoan lernantinon.

ankaŭ en Usona Samoo. Naŭ komencantoj bone progresis en tri longaj, intensaj lecionoj, malgraŭ neuzo de skribilo — ĉar "ili estas muzikistoj kaj muzik-amantoj". Desailly sugestis intervizitojn de la esperantistigoj en la du partoj de Samoo.

La plej grava samoaj ĵurnalo, *Samoa Observer*, sciigis pri prelegoj de Desailly, same kiel loka radiostacio.

Fine de majo Desailly refluĝis al Nov-Zelando, sed li pensas ke la semo trafis fekundan grundon: universitatino Wendy Percival rapide atingis bonan lingvonivelon kaj povas plu gvidi la interesatojn. Dank' al ŝi, ĉiun sabaton okazas E-lecionoj, pleje por gejunuloj. Ĉe Percival estis lasita stoko da lernolibroj kaj la vidbendo *Mazi en Gondolando*.

En danĝero

LASTMINUTE EL VIENO

Ondo de tutlanda registara ŝparado alvenis ankaŭ al Radio Aŭstria Internacia. Post la 28-a de oktobro Esperantlingvaj disaŭdigoj el Vieno okazos nur se ĉi ties redakcio sukcesos havigi la necesan sumon de

500 mil ŝilingoj (ĉ. €36 340) — malgraŭ ke ĝi estas la fremdlingva redakcio ricevanta plej multajn reagojn de aŭskultantoj. Ĉiu kun helpa ideo praktika aŭ teoria, kiel ekz. perado de komercaj reklamoj, estas petata kontakti redaktoron Katinjo Fetes-Tosegi ĉe ORF, Esperanto-Redakcio, AT-1136 Wien, Aŭstrio; roi.esperanto@orf.at. (Ret-Info)

La misio daŭras

Ankaŭ en Aŭklando Desailly plu agis per publikaj prelegoj: li taksas ke, ĉar "Aŭklando estas la plej granda urbo de Polinezio, nia oceania afero ankoraŭ daŭras".

Kiel konscienca komisiito, Desailly faris kostokalkulon: "dum 10 semajnoj mi estis for de mia hejmo, por instrui E-on, kontraŭ buĝeto de 600 usonaj dolaroj... alivorte, je ĉiutaga elspezo de nur 9 dolaroj." Efek- ➔

Tagiĝo en la lando de kvieta mateno

Ĉu la ĵusaj pozitivaj evoluoj en la rilatoj de la du Koreioj povus havi konsekvencojn por la Esperanto-movado?

Post la dua mondmilito Usono kaj Sovetio dividis la korean duoninsulon al du landoj: komunisma Norda kaj kapitalisma Suda Koreioj. Nun, post 55 jaroj tamen ekŝajnas ke la tagiĝo por reunuiĝo kaj paco fine venas. La 15-an de junio la prezidantoj de ambaŭ landoj atingis interkonsenton pri kvin punktoj, kies detalan plenumon la du landoj nun preparas. Kompreneble, reala unuiĝo, se ĝi sukcesos, venos nur post paso de multaj jaroj.

La interkonsento estas signifa ankaŭ por nia Esperanto-movado. Antaŭ longa tempo estis multaj esperantistoj en Norda Koreio, kaj (norda) Korea



Dancado kun ventumiloj de s-ro Baik (lokokonkurso de UEA, 1965)

E-Asocio eldonis vortaron en 1964. Antaŭ 25 jaroj, CHOI Duk-Shin, tiama prezidanto de la (suda) Korea E-Asocio, pro politika konflikto kun la registaro iris al Norda Koreio, kaj rendevuis

Kim Il-Sung, la tiaman prezidanton de Norda Koreio. Ni nenion aŭdis pri li ekde tiam. Ankaŭ Ĉina E-Ligo aŭdas nenion el Norda Koreio, kvankam ĈEL regule sendas tien sian organon *El Popola Ĉinio*. Mi supozas ke nia movado en Norda Koreio estas dormanta.* Tio donas al la sudkoreaj esperantistoj la novan taskon vekti la movadon en la Nordo. Se regula intervizitado okazos, ni iros al la nordo por alporti tagiĝon al la dormanta nord-korea Esperantujo. Mi esperas ke Tutkorea Esperanto-Kongreso okazos ene de 10 jaroj.

Se vi konas la nomon aŭ adreson de e-isto en Norda Koreio, bonvole informu la aŭtoron (✉lee@esperanto.net).

LEE Chong-Yeong, prez. de Korea E-Asocio

* **Red.:** “Ĉirkaŭ 10 gestudentoj partoprenas E-kursojn en Pjenjang. Antaŭ nelonge aperis nova vortaro *Esperanta-korea*, 350-paĝa” — raportis nia revuo en dec. 1964. Poste — silento.

Europa

Proksime al Eŭropa Unio

En la belga marborda urbo Oostende kunvenis (27 apr.-1 majo) la 4-a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso.

Sub alta protektado de la belga reĝo Alberto la 2-a, kun Honora Komitato el la provinca kaj urba estraroj, kaj kun Honora Listo de 10 ministroj kaj 16 eŭro-parlamentanoj, kuniĝis 330 aliĝintoj el 20 landoj.

La kongreso havis tri temojn. La ĉefan, “Ekologio, ŝlosilo por la 3-a jar-milo”, reprezentis i.a. informbudo de la ekologia Komitato Jean-Pain kaj prelego de prof. J. Országh pri akvomastromado. Kadre de la dua temo, Interkulturo, Stefan MacGill prezentis

la similmoman projekton al lokaj lernejestroj kaj eminentuloj subtenemaj.

Por konvena traktado de la tria temo, Eŭropa Unio kaj specife ĝiaj lingvaj problemoj, okazis vizito al la Eŭropa Parlamento en Bruselo kaj diskuto kun EP-anino Nelly Maes.

La komitato de Eŭropa E-Unio, la kunordiga organizo de landaj asocioj el EU-landoj, havis kvar fermitajn laborkunsidojn, kun reprezentiĝo de 9 LA-oj. Jen kelkaj el la diskutoj kaj decidoj:

- EEU lanĉas proponon pri agado por “Konstanta konferenco pri la lingvoproblemo en Eŭropo”. La LA-oj publikigos, ĉiu sialingve, tekston de deklaro por aliĝo al tiu agado kaj kampanjos por akiri subskribojn aneksotajn al petskribo submetota al EP en decembro. Oni petos aliĝon ankaŭ al asocioj neesperantistaj.

- La propono aliĝi al “Komitato 2000” de “Esperanto” Radikala Asocio estis malakceptita.

- EEU celas starigi oficejon en Bruselo kaj provizore havi tie kontakt-adreson.

- Hans Erasmus, laŭ la spertoj de la Laborgrupo pri la lingvoproblemo en EU, emfazis ke en EP-medioj restas tabuaj la vortoj *Esperanto* kaj *artefarita*, sed *diverseco* kaj *plurlingveco* ricevas subtenon. Kun respekto al tio, la laborgrupo sukcesis decidigi stariĝon de aparta komisiono, en kiu oni oficiale kaj ne malfavore parolas pri Esperanto.

- La 5a EUE-kongreso okazos en 2002 en Verono.

Laŭ raportoj de Ivo Durwael kaj Umberto Broccatelli

→ tive, bona investo. Kaj Desailly ne restas sola en sia “lingvomisiista” agado: la bahaaj e-istoj Ira kaj Satto Williams el Kvinslando (Aŭstralio)

baldaŭ transportos E-lernolibrojn el Samoo al Fiĝio, kie ili intencas komenci E-kursojn.

Laŭ raportoj de Paul Desailly

Kiam nia lingvo vere pontas

Esperanto, lingvo de amo kaj frateco? Jes, sed tio ne sufiĉas – opinias Claude Bodson, iniciatinto de Internacia Traduk-Reto pere de E-o (ITRE).

Post pli ol jarcento da evoluo, miloj da e-istoj demandas sin kiel disvolvi la eblojn de nia lingvo. Mi proponas solvon kiu trankvile kuŝas antaŭ nia pordo: la pontlingvan potencialon de E-o en profesia tradukado.

Jarcentlonga sperto montras ke la efiko de nia idealismo ne kompareblas al ĉiutaga uzo de Esperanto en la komerco kaj industrio. Ĉi tia uzo kreus milojn da postenoj. Pri la sukceso ni ne dubu: la klientoj ĉiam elektas

laŭ sia avantaĝo, ĉu la uzata metodo inkluzivas E-on aŭ ne. Niaj kontaktoj montris ke neatendite multaj traduk-firmaoj lasas malfermitan pordon al uzo de E-o, se tio povas malaltigi la kostojn kaj altigi la traduk-kvaliton.

ITRE jam ekzistas, en ĝi membras 69 tradukantoj kun 30 denaskaj lingvoj, sed ĝi ne estas sufiĉe konata de la e-istoj. Ni ofte aŭdas respondon tute kompareblan al tiu de la publiko pri Esperanto:

La emblemo de ITRE estas verko de Lionel Durandet.



Faktoj pri ITRE

Laŭ la hejmpaĝo de ITRE (<http://perso.wanadoo.fr/dan.cdm/ret/itre.htm>), rajtas membriĝi unuavice "profesiaj tradukistoj; due sufiĉe altnivelaj esperantistoj; trie fakaj tradukhelpantoj". Tamen akceptiĝas "ĉiuj dezirantoj ĝis 5 membroj por ĉiu lingvo".

ITRE-anoj devas esti ne nur lingve bonaj, sed ankaŭ komerce efikaj: ili mem esploru sian merkaton kaj trovu sian klientaron. La jara kotizo estas € 4,50, pagebla al la UEA-konto "itre-g".

En aprila kunveno respondeculoj de ITRE

decidis ke ĝi fariĝu registrita entrepreno. Laŭ komento de Henri Masson, tiel E-o faris "plian paŝon al elmovadiĝo, do al publika kredindeco".

Laŭ François Xavier Gilbert, aparte konvenaj klientoj por ITRE-anoj estas etaj familiaj entreprenoj turismaj, ĉar tradukoj en restoracioj kaj hoteloj estas ofte nekompetente farataj.

Stano Marček (<http://www.esperanto.sk>), redaktoro de *Heroldo*, estas ankaŭ profesia tradukisto, ITRE-ano. Kun la frazo "ITRE – internacia tradukreto kun sidejo en Francio", li reklamas per ofertoj sendataj al centoj da eblaj

klientoj kaj per anoncoj en la plej vizitataj slovakaj TTT-ejoj.

La frapfrazo "Rapida traduko al 33 lingvoj" baldaŭ logis al li mendojn, kiel 4-lingva traduko de ampleksa turisma katalogo, aŭ esperantigo de aŭtobiografiaĵo el orient-slovaka dialekto, por slovakdevena usonano.

La adreso de ITRE: p/a Daniel Durand, Les Nids, FR-49190 Saint-Aubin-de-Luigné, Francio; ☎/☎+33/2/41-78-47-75; ✉dan.cdm@wanadoo.fr.

Esperanto por via flug-sekuro


Laŭ statistikoj, 11% de la aviadilaj kraŝoj okazas pro miskomprenoj inter pilotoj kaj flughavenaj kontrolistoj. Ĉu Esperanto povus helpi?

Sojle de la tria jarmilo, post jarcento da aviado, ni riskas perdi vivojn pro miskomprenoj en ne-taŭga lingvo: ĉu ridinde aŭ plorinde?

Jam en 1910 Ernest Archdeacon kaj Henri Farman, grandaj pioniroj de aviado kaj de E-o, deklaris ke "ĉe la konstanta progreso de transportrimedoj facila internacia lingvo iĝis absolute necesa".

Bedaŭrinde, en 1951 la usona Federacia Aviada Instanco (FAA) trudiĝis, sen ajna scienca pravigo, al Internacia Civil-Avia Organizaĵo (ICAO) adopton de la angla kiel oficiala tutmonda lingvo de aviado. Tiam la pasaĝeraj aviadiloj – relative malrapidaj, malgrandaj, helice funkciaj – ne

estis multnombraj, sed nun la aerodromoj estas saturitaj de rapidegaj, gigantaj jetoj. La komunikado devas



okazi rapide kaj sekure, precize kaj koncize. La instrukciojn senhezite devas kompreni ĉiuj aviadistoj el la tuta mondo, sendepende de sia gepatra

lingvo. Nepre necesas lingvo internacia, tutmonda, kiom eble plej klara kaj relative facila. La lingvo plej respondebla al tiuj kondiĉoj estas Esperanto.

Kial la angla lingvo ne taŭgas?

Unue, kiun el la multaj anglaj dialektoj oni devus lerni? (Ekzemple, la usona aviada esprimo por "alstartejiĝi" estas *taxi into position*, sed alilande *line up*.) Due, kiu krom denaskuloj kapablas klare prononci tiujn almenaŭ 42 sonojn skribatajn per komplikaj kombinoj de 26 literoj? Trie, kvare, kaj longe tiel plu, obstaklas grandnombraj neregulaj verboj, fiksaj esprimoj ks.

Ne mirinde ke la usona televido NBC raportis pri 345 miskomprenoj, kraŝoj kaj preskaŭkraŝoj pro lingvaj problemoj ekde 1988 koncerne la usonajn pilotojn mem. El tiuj incidentoj 95 okazis en Usono kaj 250 alilande. Sed kiom da misoj aperis pro nekomprene en la cetera 95% de la mondo, kiu ne scipovas la anglan sed estas devigata uzi ĝin? La plej katastrofa

oni dubas, ne emas intelekto pri-studi novan proponon. En ambaŭ kazoj, tamen, la gravaj malfaciloj administraj, organizaj kaj teknikaj estas venkeblaj.

ITRE celas:

- instigi la cirkuladon de milio-onoj da dokumentoj en Esperanto;
- proponi tradukpostenojn al tradukkapablaj junuloj, lernintaj Esperanton.

La demando estas nun: ĉu sufiĉaj volontuloj pretas partopreni, komence kiel tradukantoj por kelkaj, poste kiel tradukistoj por ĉiuj?

Simpatia kantisto deklaris dum la Montpeliera UK: “Esperanto restos la lingvo de amo kaj frateco, dum la angla iĝos la lingvo por komerco kaj monaferoj”. Tio signifus mortverdikton por Esperanto. Kvankam idealisto, mi estas konvinkita ke, se la uzo de Esperanto ne alportos monprofiton, ĝi lamos dum plua jarcento kaj fine fariĝos agrabla temo por historiistoj.

Claude Bodson · Francio

akcidento, en kiu mortis 583 homoj (Tenerife, 1977), estis kaŭzita de nederlanda piloto, kiu ne komprenis anglalingvan mesaĝon senditan el la kontrolo.

Nia alvoko al la Esperanta komunumo kaj al UEA, ties kupola reprezentanto, estas ke ni konsideru serioze tiujn problemojn kaj prezentu al nia mondo kaj al la oficialaj organizaĵoj pri aviado, kiel FAA, ICAO kaj IATA (“Internacia Aer-Transporta Asocio”) la solvon kiun Esperanto povus alporti sur tiu aktuala, praktika kampo.

Kent Jones · Usono
Gilbert Ledon · Brazilo

KENT JONES (✉KentJones9@aol.com) zorgas pri politika kampanjo ĉi-tema kaj bezonas kunlaborantojn por kontakti aviadajn instancojn ĉiulande.

GILBERT LEDON (✉ssledon@iconet.com.br) taskis al si ordigi aviadajn terminaron kaj frazaron kaj bezonas teknike kompetentajn helpantojn aviadistajn.

Viglas sepdek-jara Instituto


La 24-an de majo 1930 Andreo Cseh kune kun ges-roj Isbrücker fondis Internacian Cseh-Instituton de Esperanto en Nederlando.

“Disvastigi E-on pere de Cseh-metodaj kursoj, prepari taŭgajn instruantojn, helpi ilin kaj la kursarangantajn E-istajn organizaĵojn per la necesa instrumaterialo kaj konsilado” — jen kiel vortiĝis tiam la celoj de la Instituto.

La unua direkto konsistis el Andreo Cseh mem kaj Julia Isbrücker, kaj ĝian konsilantaron eniris gravaj personoj de la tiama Esperantio, kiel Edmond

IEI jam trapasis 70 vivojarojn, ĉiam abunde agante en diversaj kampoj. Certe la Cseh-metodo estas la plej konata instrumentado en Esperantio. Diplomitaj Cseh-instruistoj en 5 kontinentoj zorgas pri la vivanteco kaj akuala uzo de la metodo.

En la eldona kampo IEI ekagis tuj en tiuj fruaj jaroj, kaj sekvis eldonaĵoj kiel *Karlo*, *La lernolibro de la vivo*, *La centa simio*, *La alia pasinteco* ktp.



Afiŝo pri la Esperanto-Domo en Arnhem (1931-40), kie okazadis Cseh-kursoj.

Privat, Felix kaj Leono Zamenhof ktp. Estis starigitaj sekretarioj en Estonio, Hungario, Latvio, Nederlando, Norvegio kaj Svedio. La unua agado de la Instituto estis organizi Pedagogian Seminarion, kiun ĉeestis 200 personoj el 20 landoj. Je ĝia fino la grupo karavanis al la UK en Oksfordo.

Andreo Cseh disvastigis la metodon kiu poste famiĝis en la E-medio sub la nomo de sia iniciatinto. En la 30-aj jaroj la Instituto kalkulis je aro de 300 diplomitaj Cseh-instruistoj, kiuj vojaĝadis instruante la lingvon: Julio Baghy, Lidja Zamenhof, Erika kaj Henrik Seppik, Lizzie kaj Tiberiu Morariu, Carl Støp-Bowitz kaj multaj aliaj.

En decembro 1933 la Instituto akiris sian propran sidejon en Hago, kie ĝi funkcias ĝis hodiaŭ. En 1952 la nomo estis ŝanĝita al Internacia Esperanto-Instituto (IEI).

Certe plej elstaras la verko *Baza Cseh-Kurso*, kiu inter 1929 kaj 1992 ĝisvivis 8 eldonojn, kaj la instrufilmo *Mazi en Gondolando* kun sia apoga materialo, lanĉita okaze de la centjara datreveno de Andreo Cseh en 1995. Inda je mencio estas la aperado (1932-70) de la revuo *La Praktiko*, dum jardekoj la ĉefa ligilo inter Cseh-instruistoj, kiu ankaŭ provizis Cseh-kursanojn per taŭga lernomaterialo.

IEI daŭre organizas lingvokursojn kaj metodikajn seminariojn por eduki novajn instruistojn pri la uzado de la rekta metodo. Ĉiujare deko da seminarioj okazas en la mondo, kie la instruistaro povas ricevi tiun fakan scion. IEI ankaŭ speciale trejnas gvidantojn de seminarioj pri la Cseh-metodo.

**Atilio Orellana Rojas; Internacia E-Instituto,
Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag,
Nederlando; ☎+31/70/355-66-77; ✉cseh@iei.nl**

Reagoj



La kontribuoj aperantaj en ĉi tiu rubriko esprimas la opinion de siaj aŭtoroj, kaj la redakcio ne respondecas pri ili.

Turisma utilo plivastigu

Mi ŝatus emfazi la turisman aspekton de la Himalaja Renkontiĝo (apr., p. 68), kiun mi povis observadi dum mia restado tie. Esperantaj aranĝoj ne ĉiam konsistu nur el kunsidoj, prelegoj aŭ decidoj pri



gravaj aferoj; ili ja estu la momento kiam ni povas aktivigi la uzon de Esperanto laŭ iu ajn vojo. La Himalaja Renkontiĝo plene sukcesis en tiu aspekto. Ĉiu esperantisto el Nepalo kiu ĝin ĉeestis, vere malkrokodile kondukis, obstine uzante Esperanton. Ili ĉiam klarigis pri la vizitindaĵoj en Esperanto, montrante ke nia lingvo estas utila en turismaj aferoj. Mi bedaŭras ke ne en pliaj landoj esperantistoj faras aranĝojn similajn, kaj kiel UEA-komisiito por Ameriko mi jam proponis al iu lando organizi similan aranĝon en tiu kontinento.

Atilio Orellana Rojas · Nederlando

Multekosta malprudento

Certe ĉiun leganton ĝojigis la informoj pri reviviĝo de la organizita movado en Slovakio (nov. '99, p. 187). Mi mem havis okazojn dum pluraj jaroj observi, eĉ preskaŭ partopreni la agadon de slovakiaj esperantistoj. Tial la artikolo gvidas min al iom dubeta pripenso. Vere, la iama Slovaka E-Asocio estis bone organizita kaj vigla, sed iuj ĝiaj funkciuloj ne ĉiam kondukis prudente. Ili agis laŭ nerealismaj planoj, kiuj tute ne respondis al la vera forto de SEA. Elspezigaj aranĝoj sen ekvilibriga enspezo kaj troigado de propra potenco kaŭzis altan enŝuldiĝon, kiu naskis gravajn miskomprenojn inter la movadgvidantoj kaj fine gvidis al tuta kolapso de la asocio. Ne la jaro 1989, tiel grava por esperantistoj en Meza kaj Orienta Eŭropo, estis la vera kaŭzo de la movadskuo en Slovakio, sed la senrespondeco de funkciuloj. 1989 ja influis parte negative la movadon en tiu mondoparto, sed ĝi alportis ankaŭ gravajn

atingojn, kiel ĉesigo de ŝtataj cenzuro kaj kontrolo, libera interŝanĝo de homoj, ideoj kaj materialoj.

Purgatorio en Slovakio vere finiĝis, sed ĉu tio estas progreso? Nur tre relativa, ĉar oni nun devas elspezi multe da klopodo kaj laboro por almenaŭ parte atingi iaman nivelon, anstataŭ disvastigado kaj utiligo de Esperanto. Similaj kolapsoj kaj revivigoj, kiuj okazis ankaŭ en aliaj landoj pro similaj kaŭzoj, multe kostas kaj demonstras al la neesperantista mondo ke ni apenaŭ kapablas bone interkompreniĝi inter ni mem, kvankam ni celas interkompreniĝi la tutan mondon.

Al la slovakaj amikoj mi deziras ke ili ne plu allasu ripetigon de sia maldolĉa sperto.

Vlastimil Kočvara · Ĉeĥio

Respekto al kio?

C. Sarandrea skribas (jan., p. 8) pri "la Papo (kun majuskla komenc-litero, mi petas, minimume pro respekto al gramatiko)".

Al kiu gramatiko?

La fundamenta gramatiko, nia sola gramatiko *preskriba*, diras nenion pri la uzo de min- kaj majuskloj.

En la antaŭparolo al la fundamento, de Zamenhof mem en 1905, la vorto *fundamento* estas skribita foje majuskle, foje minuskle — do ŝajnas ke li ne trovis la aferon tre grava.

Fine, en la tria parto de la fundamento, la universala vortaro (p. 200 en la faksimila eldono de Edistudio, 1991), ni povas legi:

"*pap*" | *papel pope* | *Papsti papa (Rimskij)* | *papiež*".

Se vi volas trudi al aliaj vian propran opinion, estas pli sekure apogi vin sur dio ol sur gramatiko, ĉar la volo de dio estas de neniu konfirmebla, sed gramatikon oni povas kontrollegi.

Gunnar Gällmo · Svedio

Malhelpa partio

Mi volas subteni la komentojn de G. Pirlot (majo, p. 87) kontraŭ ia "Esperanto-Partio" — alloga ideo, sed tre malhelpa, kiel li rimarkas.

W. J. Nesbitt · Britio

El la poŝtkesto

Eŭrop-centrismo alfabeto

Naŭze abomena estas ĝisosta persistemo je eŭropa alfabeto. Iu mal-samideano germana kriaĉas ke oni kripligas la sanktan nomon de iu germana komponisto per la esperantigo *Betoveno*. Mi kredas ke al li Esperanto estas nurnura amata ĉeva-

leto, sed ne serioza objekto lerninda. Nesaveble mankas ĉe li konscio ke en la mondo ekzistas tute aliaj alfabetoj aŭ literaj sistemoj. Danke al mia orienta humanismo, ĉar oni ne havas en Eŭropo japanajn pres-literojn, mi humile kompleksas per trans-

skribo, por ke vi povu legi en la amata alfabeto japanigon

de tiu glorplena nomo: "beetooben". Dum iuj rasis-tece gardas la eŭropan alfabeton, ni japanoj skribaĉas viajn sanktajn nomojn hundo-

bugre kaj kato-kastre.

KATOO Ivao · Japanio

Eĥigu ŝiboleto

Mi iniciatas jenan ŝiboleton, por ke retanoj indiku komence aŭ fine de sia teksto la uzatan sistemon de surogataj super-signoj: "Ŝia voĉo eĥigas jaŭde". La frazo utilos ankaŭ kiel kontrolilo ĉe retrokonvertado. Se la ideon vi trovas bona, apliku kaj disvastigu ĝin!

Ikai Yosikazu · Japanio
ikai-yosikazu@esperanto.nu



SUBVENCIO POR E-BIBLIOTEKOJ

Ĉi-jare UEA disdonos por la kvara fojo subvenciojn al Esperantaj bibliotekoj el la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen. En la pasinta jaro 9 bibliotekoj povis pliriĉigi siajn kolektojn je la suma valoro de 1825 eŭroj.

Povas peti subvenciojn Esperantaj bibliotekoj kiuj ne estas subtenataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. La peton akompanu listo de dezirataj libroj, en ordo de prefero. Kompaktaj diskoj, vidbendoj kaj aliaj ne-libraj varoj ne estas subvencieblaj. Se la peto estos akceptita, oni ricevos librojn por la valoro de la subvencio.

La subvencipetoj atingu la Centran Oficejon de UEA (adreso en la kolofono) ĝis la 15-a de oktobro 2000.

AGO-TAGO LA 7-AN DE OKTOBRO

Pro multaj demandoj ni rememorigas ke, laŭ siatempa decido de la Estraro de UEA, la Esperanta Ago-Tago ĉiujare estas la unua sabato de oktobro. Sekve, en 2000 ĝi okazos la 7-an de oktobro.

KROATA PREZIDENTO

ALTA PROTEKTANTO DE 86-A UK

La ŝtatprezidanto de Kroatio, Stipe Mesić, konsentis fariĝi Alta Protektanto de la 86-a Universala Kongreso de Esperanto (21-28 julio 2001, Zagrebo).

Delegacio de Kroata Esperanto-Ligo estis akceptita la 10-an de majo de d-ro Zdravko Jelenović, konsilanto de la prezidento pri kulturo, kiu informiĝis pri la preparoj de la kongreso. D-ro Stanko Nick, prezidenta konsilanto pri ekstera politiko, estas aktiva membro de la Honora Komitato de la Zagreba UK.

Mesić sendis siajn bondezirojn al la 4-a Kongreso de kroataj e-istoj (Djurdjevac, 27 majo).

NAVIGE TRA TTT-PAĜOJ

Jen kelkaj verdaj gutoj el la inform-oceano de Tut-Tera Teksaĵo. Sciigu nin pri pluaj konsultindaj paĝoj Esperantaj!



ARANĜOJ, OKAZEJOJ

Amasoj da fotoj pri la lasta Internacia Junulara Festivalo (Italio): <http://www.esperanto.it/iej/ijf/2000/fotoj/IJFote.html>

Esperanto-Kastelo Grésillon, Francio: <http://perso.club-internet.fr/dcardon/GreziljonoKastelo.htm>

DISSENDOLISTOJ

Por sekvi eĉ nur iomete ilian daŭran multiĝon, necesus aparta rubriko. Jen nur kelkaj ĉe <http://www.egroups.com>:

Homaj lingvaj rajtoj: group/rajtoj/info.html

Pri la eŭropa agado de E-organizoj: group/europo/

“Esperantaj diskutoj pri Esperanto”: group/esp-necenzurita/

FAKAJ ASOCIOJ

Bulteno de la Albana ILEI-Sekcio: <http://members.theglobe.com/elita5/index.htm>

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo: <http://www.ikef.org/>

Unesko-paĝo neoficiala fare de Daniel Durand, kun tekstoj tradukitaj de ITRE (vidu p. 126): <http://perso.wanadoo.fr/dan.cdm/unesco/>

KULTURO, LITERATURO

La serĉprogramo Trovanto de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno (ĉiuj libroj, broŝuroj kaj manuskriptoj venintaj al IEM post junio 1996) duobligis sian titolaron al pli ol 8000 eroj: http://www.onb.ac.at/online_s/esperanto/espdb.htm

Hiroŝima, mi vidis! Infandeseĝnaĵoj komentitaj: <http://mdat.ff.tku.ac.jp/hiroshima/esperanto/index.html>

Kaoso en Budapeŝto, el aperonta verko pri Valdemar Langlet (tr. K. Kniivilä): <http://www.algonet.se/~kallekn/esperant/BUDAPE0.htm>

Toldi, hungara epopeo en traduko de Miklós Fehér: <http://www.esperanto.hu/libroj/toldi.htm>

Enkonduko al Literatura Galerio de Adrian Hall, ses granduloj de la E-literaturo: <http://www.geocities.com/esperantolit/>

LANDOJ, REGIONOJ

“Iran-Esperanto raportas”: http://iran_Esperanto.tripod.com/

Japana E-Instituto, kun historia trarigardo kaj ligoj al japanaj TTT-paĝoj: <http://www2s.biglobe.ne.jp/~jei/hp/esp.htm>

Kroata E-Ligo: <http://jagor.srce.hr/esperanto-kel/>

Malagasio, Universala Kultura Servo: <http://takelaka.dts.mg/uks/>

Novjorko, E-Societo: http://www.geocities.com/esperanto_nyc/

Ukrainio, “Kio okazis en Kijivo”: <http://www.interactive.kiev.ua/esperanto/>

RELIGIO

En Rimini (Italio), la paroĥo S. Johano kaj Paŭlo estas eble la unua preĝejo kun Esperanta ret-ĉeesto: <http://www.diocesi.rimini.it/parrocchiehome/ssgiovannipaolo.htm>

Kelkfoje, “kristana gazeto” de Jan Hut (Nederlando): <http://home.wanadoo.nl/janhut/kelkfoje/>

Kalendaro 2000-2001

Kvankam ni laŭeble kontrolis la divers-fontajn informojn pri la menciitaj aranĝoj, ni ne povas garantii la fidindecon de ĉiu ero en ĉi tiu kalendaro. Informoj jam aperintaj en marto (p. 48-51) ne nepre estas ripetataj. La sekva kalendaro aperos en la novembro numero.

Julio

- 25 jul.-01 aŭg.: **85-a Universala Kongreso de E-o**, Tel-Avivo, Israelo (CO de UEA, adreso en la kolofono; temo: "Lingvo kaj kulturo de paco")
- 25 jul.-01 aŭg.: **Internacia Infana Kongreseto**, Hadassim, Israelo (Stefan MacGill, Bethlen G. u. 2, HU-2030 Érd, Hungario; ☎+36/23/364-198; ✉stefan.macgill@galamb.net)



- 27-02 aŭg.: **13-a Internacia Junulara Semajno**, Nyíregyháza, Hungario (HEJ, pk. 87, HU-1675 Budapest; ☎+36/1/282-88-85; ✉pandan@matavnet.hu, http://www.math.bme.hu/~hej/; temo: "Superstiĉoj")
- 30 jul.-12 aŭg.: **48-a Somera E-Tendaro**, Lančov, Ĉeĥio (Klubo de Esperanto kaj mondaj lingvoj, Třebíč, CZ-67401; E-kursoj je tri niveloj)
- 31 jul.-05 aŭg.: **E-kursoj, tri gradoj**, Grésillon*, Francio (Przemek Grzębowski, Odile Masseron, Francisko Simonnet; prelegas Georges Lagrange)
- 31 jul.-06 aŭg.: **Intermondo-3**, tendaro, Volgograd, Ruslando (Irina Mironova, RU-400078 Volgograd, Mamajevskaja 25A; ✉intermondo@esperanto.nu)

Aŭgusto

- 01-05: **Praktikado de la lingvo por infanoj kaj plenkreskuloj** (1-a nivelo), Kvinpetalo*, Francio (gvidas Josée Lafosse)
- 01-06: **Kiel reklami E-on? kaj Staĝo pri redaktado**, KCE*, Svislando
- 03-10: **Skota Semajno** junulara, Bridge of Orchy, Skotlando, Britio (Duncan C. Thomson, 2/1, 68 Roslea Drive, Glasgow, G31 2QS; ✉thom-ci0@wpmail.paisley.ac.uk; http://www.skotasemajno.org.uk/)
- 04-17: **Somera E-Lernejo**, Poprad*, Slovakio
- 05-07: **1-a Junulara Kongreso**, Bogoto, Kolombio (ABEJA, A. A. 54800 Bogotá; ☎+57/1/249-96-00; ✉abeja@egroups.com, http://abeja.go.to)
- 05-12: **56-a Internacia Junulara Kongreso kaj 19-a Komuna Seminario**, Honkongo, Ĉinio (LKK, P. O. K. 77, C N - 1 0 0 0 3 7 Beijing, Ĉinio; ✉cel@china-report.com; billmak@ibm.net; http://www.esperanto.org/ijk2000; temo: "La transiro al tutmondismo – Tutglobismo en la 21-a jc.")
- 05-12: **22-a Renkontiĝo de E-lingvaj Familioj**, Vác, Hungario (István Bagó, Kert u. 17, HU-9081 Győrújbarát; ✉bago@kern.hu)



- 05-12: **66-a Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj**, Plovdiv, Bulgario (Dančo Dančev, Bulv. Marica 6, BG-4002 Plovdiv)
- 05-13: **23-a Somera E-Feria Tendaro**, Thomsdorf, Germanio (Thomas Raabe, Wielandstr. 14C, DE-14656 Brieselang; ✉thora.brie@t-online.de)
- 07-12: **E-kursoj laŭ tri gradoj, Pec-kudrado kaj Prelegoj**, Grésillon*, Francio (resp. P. Grzębowski, M. Malézieux kaj N. Korjensevskaja-Gouriou; M. Malézieux; F. Boyet kaj F. Roose)
- 08-12: **Studo de franclingvaj tekstoj per E-o kaj Preparado al la skriba parto de Altaj Studoj**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Janine Dumoulin resp. Georges Lagrange)
- 08-13 kaj 15-20: **3-a Plurnivela Internacia Kursaro**, KCE*, Svislando (kun Stano Marček, Ljubomir Trifončovski, Stefan MacGill, Giorgio Silfer)
- 10-20: **OKSEJT**, somera tendaro, Ivanovo (Andrej Ananjin, ul. Ikranistovoj 2-28, RU-153003 Ivanovo; ✉oksejt2000@nm.ru)
- 12-15: **LSG-restado** (Ligo de Samseksamaj Gee-istoj), Épinal, Francio (Jean-Michel Chambréuil; ☎+33/3/88-37-02-91; ✉jmcesp@minitel.net)
- 13-27 aŭg. kaj 01-10 sep.: **34-a Internacia E-ista Feriado**, Kudowa Zdrój, Pollando (Silezia E-Asocio, str. Dubois 3/1, PL-50-208 Wrocław; ✉lserwatka@poczta.onet.pl)
- 14-16: **Simpozio pri la verkado de Mao Zifu**, Changde, Hunan, Ĉinio (ZHANG Saŭkio Shaoji; ☎+86/20/83-69-71-94; ✉sauxkio@hotmail.com)
- 14-19: **E-kursoj laŭ du gradoj, Jogo kaj Prelego**, Grésillon*, Francio (resp. Josée Lafosse kaj Juanita Turbillon; Rose-Marie Laveau; Ginette Gabillon)
- 15-20: **Azia E-Renkontiĝo AERO 2000**, "En la koro de la Granda Silka Vojo", sub UEA-aŭspicio, Samarkand, Uzbekio (Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, Pk. 76, UZ-703000 Samarkand; ✉+7/3662/333-971 [por s-ro Anatoli Ionesov]; ✉peaceetur@samuni.silk.org)
- 16-19: **De Zamenhof al Pi: literaturo kiel evoluiĝo de nia lingvo**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Chris Declerck)
- 16-24: **6-a Internacia Arkeologia Laborbrigado**, Blera, Italio (Pier Luigi Cinquantini, via Dante 2, IT-01010 Blera; ☎+39/761/479-503; ✉pcinqua@tin.it, http://web.tiscalinet.it/cinquantini/ial.htm)
- 18-20: **3-a Renkontiĝo de ĉeĥaj kaj slovakaj katolikoj e-istoj**, Žilina, Slovakio (Vladimír Němec, Zvolenská 5, SK-01008 Žilina; http://web.tiscalinet.it/ikue_romo/zilina.html)

* ADRESARO

Jen la adresoj signitaj per asterisko tra la kalendaro rubriko. Ĉiuj aliaj adresoj troveblas post la koncernaj aranĝoj.

Grésillon: Château, FR-49150 Bauge, Francio; ☎+33/2/41-89-10-34; ✉kastelo.gresillon@free.fr

KCE: Kultura Centro E-ista, C.P. 311, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando; ☎+41/32/926-74-07; ✉kce.esperanto@bluewin.ch

Kvinpetalo: FR-86410 Bouresse, Francio; ☎+33/

5/49-42-80-74; ✉rpley@club-internet.fr

Poprad: Esperanto – Regiona Societo, Sobotské nám. 36, Poprad, Slovakio; ☎+421/92/32-419; ✉milanzvara@hotmail.com

Smyčka, Miroslav: Kojetická 90, CZ-400 03 Ústí nad Labem, Ĉeĥio; ☎+420/47/553-24-17

Interreto. Monate aktualigata listo de ĉiuj konataj E-aranĝoj konsulteblas ĉe la TTT-paĝoj www.esperanto.hu/kalendar.htm. Por ricevi txt-version de la plena kalendaro, sendu retmesaĝon (enhavo ne gravas) al la aŭtomato <kalendaro@esperanto.org>. En papera versio ĝi aperas po monataj blokoj en *Eventoj*.

- 19-20: **32-a Korea Kongreso de E-o**, Pusan, Koreio (KEA, 1601 Kangbyon Hanshin Core B/D, 350 Mapo-dong, Mapo-gu, Seoul — 121-703; ☐pusanesperanto@hotmail.com)
- 24-26: **2-a E-kongreso de la Hinda Oceano kaj Orient-Afrikan landoj**, Malagasio (Malagasa E-Asocio, B.P. 3171, 101-Antananarivo)

5^a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto

Meksikurbo, 15-21 apr. 2001

- 26 aŭg.-02 sep.: **26-a Internacia Semajno ĉe Mediteraneo**, kun Cseh-seminario "B", Sète ĉe Montpellier, Francio (Yvette Vienne, 5 rue Docteur Roux, FR-34090 Montpellier; ☎/☐+33/4/67-54-15-43; ☐yviene@netcourrier.com)

septembro

- 01-03: **Skota Studrondo**, Dunblane, Britio (David Bissett, ☐david@bisset100.freeserve.co.uk)
- 01-03: **Sporta Semajnfino**, Épinal, Francio (Philippe Rieunau, 22, rue du Parc, FR-57200 Sarreguemines; ☎+33/3/87-95-52-92; ☐philippe.rieunau@wanadoo.fr)
- 01-05: **Astronomio: inicado kaj praktikoj**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Patrick Lagrange)
- 01-09: **TEJO-seminario**, Varna, Bulgario (Aleksandar Šivarov, p.k. 405, BG-9000 Varna; ☎+359/52/246-941, ☐246-326; ☐a.shivarov@mailroom.com; TEJO-Oficejo: ☐tejo-officejo@wxs.nl; temo: "Balkana junulara kunlaboro por kulturo de paco")
- 02-08: **53-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo E-ista**, Rimini, Italio (☐c.sarandrea@agora.stm.it)
- 06-13 kaj 13-19: **Intensa E-kurso**, Agárd, Hungario (HEA, p.f. 193, HU-1368 Budapest; ☎+36/1/268-03-06; ☐268-03-31; ☐esperantohea@matavnet.hu)
- 07-10: **Mikologia Seminario**, Poprad*, Slovakio
- 08-10: **51-a Kongreso de Bulgara E-Asocio**, Karlovo, Bulgario (Bojdar Leonov, p.k. 44, BG-4300 Karlovo)
- 08-13: **La recenzo-arto en E-o**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Ed Borsboom)
- 21-24: **11-a Montkabana Renkontiĝo**, Vrščic, Slovenio (Vanja Radovanović, Horvaĉanska 31, HR-10000 Zagreb, Kroatio; ☐Vanja.Radovanovic@etk.ericsson.se, http://www.angelfire.com/va2/Vanja)
- 22-24: **12-a Alp-Adria E-Konferenco**, Ptuj, Slovenio (SEL, p.k. 1643, SI-1001 Ljubljana; ☐Slovenio@esperanto.nu; temo: "Turismo kaj E-o")
- 23 sep.-01 okt.: **26-a Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo kaj Cseh-seminario "B"**, Bydgoszcz, Pollando (Monda Turismo, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz; ☎/☐+48/52/341-57-44; ☐andreo@rubikon.net.pl)

- 24-29: **5-a Sesio de Interlingvistikaj Studoj**, Poznań, Pollando (Lingvistika Instituto, UAM, Międzychodzka 3-5, PL-60-371 Poznań; ☐ikoutny@amu.edu.pl; vidu p. 138)
- 29 sep.-01 okt.: **16-aj Artaj Konfrontoj en E-o** kun oratora konkurso, Poznań, Pollando (Tadeusz Chrobak, str. Piłsudskiego 11/32, PL-62-028 Koźiegłowy; ☎+48/61/812-78-05; ☐tchrobak@fri3.onte.pl; temo: "Ĉu E-o estas bezonata?")
- 29 sep.-01 okt.: **13-a Internacia Kultura Festivalo**, Ústí nad Labem, Ĉeĥio (Smyčka*)
- 30 sep.-01 okt.: **Aŭtunaj Tagoj**, Iitti, Finnlando (E-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, SF-00530 Helsinki; temo: "Sano kaj sanigado")
- 30 sep.-07 okt.: **8-a Internacia E-Semajno de la Kulturo kaj Turismo kaj Baza Cseh-kurso**, Blanes, Katalunio, Hispanio (HFEA, Apartado 15027, ES-08080 Barcelona; ☎+34/93/27-50-21; ☐37-83-65-11; ☐luis_serrano@mixmail.com)

oktobro

- 07: **Ago-Tago (CO de UEA)**
- 13-15: **87-a Japania E-kongreso**, Kumamoto, Japanio (JEI, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tōkyō-to 162; ☎+81/3/32-03-45-81; ☐32-03-45-82; ☐jei@mre.biglobe.ne.jp)
- 22-25: **Monda Junularo per E-o, Amikaj Renkontiĝoj**, Miercurea Ciuc, Rumanio (Jolanda Józsi, str. Patinoarului 12-A p. 3, RO-4100 Miercurea Ciuc)
- 26-30: **Praktikado de la lingvo**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Nina Korjenevskaja-Gouriou)
- 27-29: **Poma Semajnfino**, Caen, Francio (Yves Bachimont, 106 rue d'Orléans, FR-14000 Caen; ☎+33/2/31-75-15-74; ☐YBachimont@esperanto.org)

novembro

- 01-04: **Rusa semajno**, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Nina Korjenevskaja-Gouriou)
- 04-05: **11-a Kongreso de UkrEA**, Kievo, Ukrainio (Volodimir Hordijenko, p.k. 35, UA-252133 Kiev 133; ☎+38/044/295-17-01; ☐ukrea@esperanto.nu)
- 08-10: **Terminologia seminario** antaŭ KAEST; temo: "(Ne nur) fervoja transporto kaj trafiko"

86-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Zagrebo, 21-28 jul. 2001



- 10-12: **KAEST 2000**, Kolokvo "Aplikoj de E-o en scienco kaj tekniko", sub aŭspicio de UEA, Prago, Ĉeĥio (KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice; ☎+420/2/991-22-01; ☐991-21-26; ☐kaest@kava-pech.cz, http://kava-pech.cz/kaest; temo: "Ekonomio sojle al la tria jarmilo")

- 25: **Malferma Tago de la CO de UEA**
- 25: **2-a Esperanta Filmfestivalo**, Bratislava, Slovakio (Pavol Kaščák, Vážska 21, SK-82107 Bratislava; ☐esperanto@nextra.sk, http://www.home.sk/www/esperanto/informoj.htm)

decembro


- 01-03: **Sankta-Nikola festo**, Murzasichle, Slovakio (vd. Poprad*)
- 01-03: **Jarfina kaj Zamenhofa Festo**, Lepsiko, Germanio (Werner Geidel, Karlsruher Str. 5, DE-04209 Leipzig; ☎+49/341/411-85-77)
- 08-10: **Faulhaber-semajnfino**, Elspeet, Nederlando (Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL-1704 BH Heerhugowaard; ☐ten.hagen.esperanto@wxs.nl; temo: "Revoj kaj idealoj por la 21-a jc.")
- 09: **17a Ĉeĥa-Saksa Tago**, Ústí nad Labem, Ĉeĥio (Smyčka*)
- 10-15: **Zamenhofa semajno**: lom pli pri la unuaj E-revuoj, Kvinpetalo*, Francio (gvidas Thérèse Pinet kaj Georges Lagrange)
- 27 dec.-03 jan.: **17-a Internacia Festivalo**, Trier, Germanio (Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Niedenstein; ☎/☐+49/5624/8007; ☐HDP@internacia-festivalo.de, http://www.internacia-festivalo.de; temo: "E-o kaj infanoj")
- 27 dec.-03 jan.: **44-a Internacia Seminario**, Cuxhaven, Germanio (Germana E-Junularo, Grellstr. 36, DE-10409 Berlin; ☎/☐+49/30/42-85-78-99; ☐bero@esperanto.de, http://www.esperanto.de/is/; temo: "Kia estonteco?")

2001

- 21-27 feb.: **Semajno de Internacia Amikeco**
- 15-21 apr.: **5-a Tutamerika Kongreso**, Meksikurbo (Meksika E-Federacio, Apdo. 10576, México 06000, D. F.; ☐jrosillo@comversens.com, http://punto-y-aparte.com/esperanto/agado.html; temo: "Ameriko, unu kontinento, diversaj historioj")
- 12-19 majo: **53-a Kongreso de Internacia Fervojista E-Federacio**, Tábor, Ĉeĥio (KAVA-PECH, Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice; ☐ifef-kongreso@kava-pech.cz, http://www.kava-pech.cz/IEF-kongreso/index.htm)
- 14-20 jul.: **74-a Kongreso de SAT**, Nagykanizsa, Hungario (Tibor Szabadi, Pf. 66, HU-8800 Nagykanizsa; ☐esp.sz.tibor@sienet.hu)
- 21-28 jul.: **86-a Universala Kongreso de E-o**, Zagrebo, Kroatio (CO de UEA; temo: "Kulturo de dialogo - dialogo inter kulturoj")
- 28-30 jul.: **Internacia simpozio pri lingva planado kaj leksikologio**, Akademio de E-o kaj Kroata Akademio de Sciencoj kaj Artoj, Zagrebo, Kroatio

2002

- 03-10 aŭg.: **87-a Universala Kongreso de E-o**, Fortaleza, Brazilo (CO de UEA)



Recenzoj

Informado

Solide, plaĉe, super dekmilo

Esperanto. Das neue Latein der Kirche. *Die internationale Sprache im Dienst der Verständigung unter evangelischen und katholischen Christen.* Dr. Ulrich Matthias (1966). Messkirch: Armin Gmein, 1999. 125p. 21cm. Bind. Germanlingva. € 9,00.

Matematikisto Ulrich Matthias estas eble la plej aktiva informadanto kaj instruisto en la germana Esperanto-komunumo. Post *Esperanto — das interkulturelle Erlebnis* (1991) li duan fojon alparolas germanlingvanojn pri Esperanto. Vendi Esperanton kiel “latino de la demokratio” estas malnovaĵo; nun ĝi fariĝis “la nova latino de la eklezio”.



Troviĝis ordinara germana eldonejo, ekleziema, kiu presis la verkon iniciatitan de la pastro-samideano Bernhard Eichkorn en kvanto de ne malpli ol dek mil ekzempleroj. Jam dua samkvanta eldono survojas. Certe Matthias devis resti iel inter la limoj de tradicia esperantismo; samtempe li devis prizorgi la atendojn de katolika legantaro. Sed la

rezulto estas solida informadaĵo eĉ ne forpuŝanta nereligiecmajn homojn, kaj ebliganta akcepti la informojn sen senti nepran postulon aliĝi. La stilo plaĉas kaj evitas troojn en kvanto kaj prijuĝo; bonvenas kiel Matthias rifuzas mitojn kaj kontrastigas ekz. dubajn papajn subtenojn kun elekto de dokumentitaj pozitivaj eldiroj, interalie de la posta papo Karol Wojtyła.

Kompreneble ankaŭ bonaj, salutindaj kaj donaceblaj libroj kutime ne prezentiĝas tute neriproĉeblaj. La antaŭparolo de pastro Eichkorn povus aspekti strange al leganto, ekz. peto pri mondonaco al “nia konto”. Foje estintus stile konvene rezigni pri kelkaj nenecesaj detaloj. Tre entuziasmegeblajn piulojn tio ĉiukaze ne povos malhelpi profiti de la libro.

Ziko Marcus Sikosek · Germanio

Forte, klare, argumente

Everyone's own language. *A guide to the international language known as Esperanto.* Maire Mullarney (1921). Dublin: Nitobe Press, 1999. 188p. 20cm. Anglalingva. € 6,00.

La unua litero de la titolo prezentiĝas kiel la simbolo por la nova valuto leŭropa. Same kiel la eŭro estas la mono por ĉiuj, Esperanto estu la lingvo por ĉiuj. Tiu literludo, mallonga antaŭparolo kaj kelkaj aldonoj estas novaj. Krom tiuj, la libro estas reeldono de *Esperanto For Hope*, originale aperinta en 1989.

Maire Mullarney estas patrino de granda familio, ĵurnalisto kaj verkisto. Ŝia libro *Anything School Can Do, You Can Do Better* (“Kion lernejo kapablas, vi mem faros pli bone”) argumentas por gepatra

hejma instruado. Ŝi mem hejminstruis siajn infanojn dum jaroj.

La libro estas konversacieca kaj aŭtobiografia. La aŭtoro priskribas kiel ŝi renkontis Esperanton, ellernis ĝin, uzis ĝin, amikiĝis per ĝi, vojaĝis per ĝi kaj riĉigis sian vivon per ĝi. Ekzemple, estas unu ĉapitro pri ŝia spertoj ĉe la Universala Kongreso en Pekino en 1986.



Iom post iom Mullarney enmetas lecionetojn pri kaj alineojn en Esperanto. Kiuj legas angle ne komprenante E-on, povos preteratenti tiajn erojn de la libro, sed se ili studos tiujn, je la fino de la libro ili scipovos iugrade legi ĝin.

Unuavide la libro aspektas iom naiva, sed fakte ĝi tre klare kaj tre forte prezentas argumentojn por Esperanto kiel universala dua lingvo. Ekzemple, Mullarney donas la ekonomikan argumenton de Piron, ke la mono malŝparata por tradukaj celoj en internaciaj organizoj kiel la Mondana Organizo pri Sano povus savi grandan kvanton da homaj vivoj.

Post kiam Mullarney esperantistiĝis, ŝi iĝis magistro pri lingvistiko kaj prelegis pri E-o ĉe lingvistika mondkongreso. En tre valora ĉapitro ŝi pritraktas E-on lingvistike kaj prezentas fortajn tiajn argumentojn por tiu iugrade jam sukcesa internacia lingvo. Tiu ĉapitro mem valoras la prezon de la libro. Mi bonvenigus pliajn verkojn de ŝi pri tiu temo.

Sylvan Zajt · Usono

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO! fariĝu patrono de TEJO

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- *TEJO tutmonde* (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn.

Oportuna referenco

Kio estas demokratio? 80 demandoj kaj respondoj (1995). David Beetham, Kevin Boyle. Kun desegnaĵoj de Plantu. El la angla trad. Geoffrey Sutton. Rotterdam: UEA, 2000. 143p. 21cm. € 9,90. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Kial recenzo de tiu ĉi specifa libro en la UEA-revuo? La neesperantlingva originalo ne kontribuas rekte al la Esperanta kulturo; la bona efiko estas do nereakta, filtro de ekzogena atingo en la Esperantan medion — efiko bona, ĉar la nivelo de la niakomunuma klereco ne estas tiel alta kiel oni fanfaronas.

Al mi ŝajnas ke la signifo de la libro konsistas, unualinie, en tio ke ĝi estas manifestaĵo al Unesko. Tiom pli ke, kvankam la libro certe traktas la homajn rajtojn, ĝi diras vere malmulte pri la lingvaj rajtoj, sed tio estas neevitebla pro la naturo de la libro.

La totala takso de la recenzanto tute ne estas negativa, sed kontraŭe tre pozitiva. Senhonta finvenkisto, eĉ se venko venus en cent jaroj, aŭ neniam, mi opinias ke la politiko de UEA ekde Lapenna estas ĝusta.

Ne havante la originalon, mi ne povas taksu ĉu la traduko estas fidela sed nur kredi tion. Pri la lingvaĵo, oni rimarkos ke la stilo estas angleca, kiel vidigas la uzo de la artikolo. Unu impresio: por la okuloj al kutimiĝintaj al la interpunkcio de la UEA-revuo, la libro aspektas iom laciga. Ni lasu flanke la lingvaĵon; kio estas la enhavo?

Ĉioninkluziva kompendio

Ĉioninkluziva, tial lernolibra, norma, oportuna por referenci, por ordigi jam akiritan konon. Aliflanke, komunkona, ĝi entenas tamen ie-tie freŝajn atentigojn, sed ili estas freŝaj eble nur por mia malklereco. Por atesto: mi legis eĉ ne unu titolon el la bibliografio. *Capitalism, socialism and democracy* mi legis, sed de alia aŭtoro: Schumpeter, libro interesa, ĉar de ekonomikisto kaj geniulo aldone, dum la libro recenzata ne ekscitas. La anglosaksa kulturo ne ekscitas ĝenerale. Kaj brita, kolorata de la fama *understatement*, diferenca de la usona, kiu tendencas esti iom arda, kiel s-ro John Foster Dulles aŭ prof. Samuel Huntington.

aporio: senelira kontraŭdiro
understatement (angle): maltroigo, litoto

La libro estas riĉe ilustrita de Jean Plantu, ĉefdesegnisto de la Pariza gazeto *Le Monde*.



Liberalisma

Ĉar la libro estas post-malvarmmilita, ĝi komplete estas libera de la obsedo pri la komunismo, kiun ĝi apenaŭ mencias. La aŭtoroj ŝajnas havi afinecon kun “la social-demokratio de la Okcident- kaj Nord-Eŭropaj landoj de post 1945” (p. 32). El tio devenas la manko de la klasa vidpunkto. Kiam ili traktas malfacilon de demokratio en evolulandoj, la problemo estas atribuita al svaga socia klimato, kaj ne estas konsciata la klasa antagonismo duobla, enlande antaŭmoderna kaj ekstere kapitalisma. El tio venas nehistorio de la ekspliko. Ili skribas: “Registaro serioze aŭskultos la popolon nur kiam ekzistas reala ebleco, ke oni forigos ĝiajn anojn el iliaj postenoj, se ĝi ne aŭskultos” (p. 20). Tio estas argumento por la neceso rajti revoki reprezentantojn, kiu estis fundamento de la laboristaj konsilioj en Rusio de 1905 kaj de 1917. Tiuj kiuj kontraŭstaris la rusajn tankojn en Budapeŝto en 1956 estis ĝuste la samaj: tie la sovetaĵ-konsiliaj janiĉaroj strangolis la konsiliojn kuntirantajn Maléter, György Lukács kaj Imre Nagy. Kial la laboristaj konsilioj fariĝis la instrumentoj de subpremado estas la plej granda aporio de la politika scienco,

ankoraŭ aktuala, sed ĝi ne estas traktata en tiu ĉi libro. Tio estis ankaŭ neevitebla.

Hazardaj plukoj

La aŭtoroj agnoskas la neceson de ekstera interveno “eĉ kontraŭ la deziroj de la plimulto”, sed emfazas la rolon de internaciaj institucioj, pli ol de ŝtatoj de industriaj landoj. Tiu alproksimiĝo estas pli eŭropeca ol usoneca.

Laŭ ili, “dum demokratio estas universalisma doktrino [...], naciismo estas apartisma” (p. 37). La unua tendenco al inkluziveco, dum la dua al ekskluziveco. Post kiam regiono sendependiĝas surbaze de diferencoj lingva, religia kaj aliaj, ankoraŭ estiĝas nova malplimulto en tiu nova malgranda naci-ŝtato. Tiu serio de disdivido povas senfine progresi. Oni simple rigardu Bosnion. “La koncepto de naci-ŝtato kiel hejmo de unu sola nacio aŭ etna grupo estas nenie realiĝinta” (p. 37).

La monarkio estas tikla temo por britoj, kaj la aŭtoroj diras nur ke ĝi “apenaŭ estas demokratio” (p. 48). Se mi ĉi tie imitu la relativismon de la aŭtoroj, kiu certe estas unu el iliaj meritoj, monarkio povas ludi pozitivan rolon por demokratio: Hispanio povis transiri sensange de la aŭtokratio de Franco al demokratio danke al la reĝo Johano Karlo, kiu ne sekvis la preceptojn de la mortinta diktatoro, sia mentoro. Ni japanoj memoras ke la nuna reĝo deklaris eĉ sia surtroniĝo ke li gardos la konstitucion, je la konsterniĝo de dekstruloj, tiel subfosante ĉi ties grundon.

Kvankam al la naciismo, unu el la du pestoj post la disfalo de la soveta bloko, la aŭtoroj liveras juĝon sufiĉe klaran, tamen al la religio ilia pozicio ne estas tiel distinga; nature, oni diras, el ilia konservativismo.

La libro ankaŭ pritraktas la referendumon prudente, klare, dum en la japana politiko, la regantaj politikaj partioj, neniel demokrataj, nur kalumnias ke ĝi estas negado de la reprezenta sistemo: ekzemplo ke abstrakta argumento ne efikas en reala apliko.

Konklude...

Aĉetu tiun ĉi libron, tiamaniere subtenante UEA. Pli bone, metu, el via fervoro, viajn eventualajn demandojn al la aŭtoroj, “p/a UEA”, kiel alvokas la antaŭparolo.

YAMASAKI Seikō • Japanio

Norda izolo tutmonden

Lando malekzista. Edith Södergran (1892-1923). El la sveda trad. Sabira Ståhlberg. Varna: Bambu, 1999. 92p. 20cm. € 9,30.

Kelkaj aŭtoroj verkas en minoritata lingvo: kaj nur Esperanto donis al multaj el ni la eblon legi, ekzemple, la ĉefverkojn de Imre Madách (*La tragedio de l' homo*, tr. K. Kalocsay, Budapeŝto, 1965) aŭ de Adam Mickiewicz (*Sinjoro Tadeo*, tr. A. Grabowski, Varsovio, 1918). Aliaj aŭtoroj verkis minoritate kvankam interne de majoritata lingvo: tia uzado de la germana, ekzemple, karakterizas la verkojn de Kafka. Sed en Edith Södergran vi ĝuos minoritaton eĉ pli intencan: la poetino verkis en la sveda, sed vivis en Finnlando; ŝi nome apartenis al la svedlingva minoritato de tiu lando. Tio jam destinis ŝian verkaron al granda izoliteco; fakte nemultaj aprecioj ĝin dum ŝia vivo, kaj nur postmorte ŝia nomo famiĝis inter svedlingvaj poezi-amantoj.

Edith mem konsciis pri la mallarĝa perspektivo kiu inkluzivis ĉion kion ŝi amis



Edith Södergran

kaj prikantis: en la unua poemo de ĉi tiu kolekto arbo, preĝejo, virino estas fermitaj en cirklo, "kiun neniu transpaŝas" (p. 8). La pejzaĝo de Finnlando tre gravas en ŝia poezio: arbaro, lagoj, riveroj, ĉio fandiĝas en spirita komunumo, kiun oni povas samtempe ami kaj rigardi kiel opresan. Ĉi lasta plej ofte okazas en la plej fruaj poemoj, ekzemple: "Onidire mi naskiĝis prizonita — / neniun vizaĝon mi ĉi tie rekonas" (Mi, p. 11), aŭ: "Mia animo

la fremdajn landojn tiom amas, / kvazaŭ ĝi ne havus hejmlandon" (*Fremdaj landoj*, p. 23). Kaj ankaŭ fremdaj arboj iel estas pli allogaj:

*Buntan fruktaron havas arbo fremda,
kun purpuraj pendaĵoj staras arbo fremda
sur sundeklivo kaj milde flustras:
[...]*

*Vi vivos fore de via hejmo kaj vi feliĉos.
(Fremda arbo, p. 27)*

Sed fine de ŝia mallonga vivo, kiam malriĉo kreskis en postmilita Finnlando kaj la poetino post kelkaj vojaĝoj devis retiriĝi al sia naskiĝurbeto Raivola, la norda pejzaĝo fariĝis inspirfonto tiom intensa kiom en la samtempaj versaĵoj de Jesenin (kies poezio evidente influis ŝin, laŭ mia impresio):

*Arboj el mia infanaĝo jubile ĉirkaŭas min:
homo!
Kaj herbaro min bonvenigas el lando fremda.
[...]
Mi trinkas nun saĝon el suka krono picea,
mi trinkas nun veron el seka betultrunko,
mi trinkas potencon el herbeto plej gracila:
granda protektanto etendas grace al mi la manon.*

(*Hejmenveno*, p. 77)

Ĝuste tiu animismo kaŭzas finfine la transformiĝon de la nordia pejzaĝo en tiun "landon malekzistan" kiun la poetino tiom sopiris dum la tuta vivo, kaj kiun ŝi laste trovis en sia poezio mem:

*Mi sopiras al lando malekzista,
ĉar ĉion ekzistan mi lacas avidi.
[...]
Mia vivo iluziis brule.
Sed unu mi trovis kaj unu mi vere malkovris —
La vojon al la lando malekzista.
(Lando malekzista, p. 79)*

Ankaŭ la sporadaj Nietzsche-influoj, kiuj instigas ŝin himni al la vivo kaj al anim-grandeco, ne povas malhelpi ke ŝia nihilisma vejno fine elmergiĝas, kiel en tiu mirinda lul-kanto kiu komenciĝas: "Trankvilu, infano mia, ekzistas nenio, / ĉio estas kia vi vidas: arbaro, fum' kaj fuĝo de reloj." (*Nenio*, p. 38). Nenio rezistas, ankaŭ ne pasio, ĉar "ĉiuj lipoj fridiĝas kun la tempo". La mallonga sed kompleta vivo de Edith Södergran plenumiĝis en ĉi tiu "kurioze fulma realo" (*Demando*, p. 57).

Tiun ĉi unuan tradukon en Esperanto ni ŝuldas al la sindediĉo de Sabira Ståhlberg, kiu ankaŭ prizorgis la interesajn bio-bibliografiajn notojn en la fino. La lingvaĵo estas senmakula kaj elvokas poeziecon ankaŭ manke de perforta neologismemo. La volumo estas bele presita, kun agrabla kovrilpaĝo, kaj preseraroj ŝajne malĉeestas. Rekomendinda atesto pri norda poetino, kies verkaron probable ni malfacile trovas en nacilingvaj tradukoj.

Mauro Nervi · Italio

Muziko

Disko ekstermonda

Lingvo intermonda. Dolcxamar. Donneville: Vinilkosmo, 2000. Kompakta disko. 32 min. € 15,00.

Aprile "Laste aperis" lakonis la bandon Dolcxamar (dolĉa mar? dolĉ-amar?) finnbrita. Neni! Jen bando plene finna, Esperanto-avataro de la finnlingva Punaiset Messiaat ("Ruĝaj mesioj"). Samloke, pri ĝia stilo: "rande de repo [rapida ritma parolado], hiphopo kaj 'ekstertera teknoroko' [speco de komputila rokmuziko]". Alivorte, muziko nuntempa, freŝa, alterna-

tiva kaj mestiza, sonkvalite profesia kaj senpudore radi-elsendebila, perfekta por aŭskultigi al junaj unuafojaj aŭdantoj de nia lingvo. (Mi nur riproĉus plurfojan mislokadon de la akcento.) Kaj, el teksta vidpunkto, provokema, kiel tiu de la "hispano" meksika bando Molotov. Ekzemple, la kanto *F**iĝu!*, kun la sola vorto "Fikiĝu!". Aŭ *Ĉu vi pretas?*, principdeklaro de tuta generacio ("jen estas aŭtentika sentaŭgulo — kaj fiero"). Aŭ, ĉefe, *Lingvo intermonda*, kiu, de la komenca, ŝablona verso "Paco kaj am'", igas onin aerobiki surprizate ĝis la kantofine perversa "Lingvo de Diablo". Mi konfesas ke, ĝuinte ĉi kodoon, mi avidas ĉeesti ilian KEF-koncerton.

Jorge Camacho · Hispanio

Laste aperis



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!

Avinjo (1976). Peter Härtling (1933). Bildoj de Peter Knorr. El la germana trad. Nora Caragea. Frankfurt am Main: la tradukinto, 2000. 79p. ISBN 3 00 006168 1. 21cm. Kiel 5-jara Kalle kaj 67-jara avino kunvivas post lia orfiĝo. La verko ricevis la Germanan Premion de Junulara Libro. € 10,80.

Balado de la rektadorsa homo. Zlatko Tomićić. El la kroata trad. Josip Velebit (1911-2000). Berkeley: Bero, 2000. 55p. ISBN 1 882251 29 6. 28x 11cm. Pensoj poeziaj, plej ofte nur kelkliniaj. € 5,40.

Ĉatre tinerii mei cititori. *Esperanto în actualitate.* Ignat Florian Bociort (1924). Berkeley: Bero, 2000. 56p. ISBN 1 882251 30 X. 22cm. Rumanlingva. Pledo por E-o; tezoj pri la stato de nia movado. € 7,50.

En la kelo (1893). *La Epoko: Kajero 143(4).* Iĉhok Lejbuŝ Perec (1852-1915). El la jida trad. Tomasz Chmielik. Svidniko: Libro-Mondo, 1993. 14p. 28cm. Novelo de fonda patro de la juda literaturo, moderna romantikisto. € 3,90.

Esperanto in Leipzig und Umgebung 1945-1991. Hefte 5 und 6: Fotos und Anlagen. Komp. Rolf Beau. Althen: DEB Landesverband Sachsen, 1999. 44+98+6+32p. 21cm. Germanlingva. Historio de la E-movado en la Lepsika regiono. Volumoj 5-6 el 6-parta komentita dokumentaro. € 7,50.

Esperanto Language, The. Frank Nuessel. New York / Ottawa / Toronto: Legas, 2000. 153p. ISBN 0 921252 95 1. 23cm. Angla-lingva. Historia, kultura kaj lingva prezento de Esperanto kaj de ĝia iniciatinto, por ĝenerala publiko. € 24,90.

Esperanto-mono. *Ilustrita historio pri universala monosistemo.* Hans Jankowski (1929). Kaunas: Auŝra, 2000 (2-a kaj kompletigita eld.). 32p. ISBN 9986 941 49 0. 24cm. € 4,80.

Fasto (1890). *La Epoko: Kajero 143(12).* I. L. Perec. Vidu ĉe *En la kelo*. 11p. € 3,30.

cantoj. Mikaelo Bronŝtejn (1949). Moskvo: Impeto, 2000. 51p. ISBN 5 7161 0069 4. 22cm. Grade malfaciligantaj tekstoj. Kun Esperanta-rusa vortlisto. € 4,50.

Meŝuleĥo (1890). *La Epoko: Kajero 143(7).* I. L. Perec. Vidu ĉe *En la kelo*. 16p. € 3,90.

Naŭ veraĵoj kaj aliaj mirindaj rakontoj el la Pireneoj, La. Adelin Moulis (1896-1996). El la franca trad. Christian Lavarenne. Balagué: Hejmoj, 1999. 38p. 21cm. Dulingva: E-provenca (en tradukoj proza kaj poezia). Tradiciaj tekstoj, kolektitaj de fama langvedoka verkisto. € 6,60.

Omaĝe al Kálmán Kalocsay. *Tradukinto de la internacia lingvo.* Ada Csizsár (1930). Budapest: KAL-ĈI Dokumentaro, 2000. 152p. 30cm. Ringe bind. Tria vol. de ampleksa biografia kompilaĵo. Prezento de Kalocsay kiel poem-tradukinto. € 24,00.

Pia kokino, La. *La Epoko: Kajero 143(10).* I. L. Perec. Vidu ĉe *En la kelo*. 10p. € 3,60.

Raporto el Japanio 3. *Januaro-decembro 1999.* HORI Yasuo (1941). Tokio: Libroteko, 2000. 114p. ISBN 4 947728 22 1. 21cm. Kun fotoj. Mallongaj raportoj pri diversaj aspektoj de la japana vivo. € 13,50.


Stone City, The. Anna Lowenstein (1951). London: Citron Press, 1999. 229p. ISBN 0 7544 0098 0. 21cm. Angla-lingva varianto de la romano *La ŝtona urbo*. Juna keltino en la unua jc. de nia epoko konatiĝas kun Romo kaj fruaj kristanoj. (Vidu jun. '99, p. 118). € 18,00.

Ŝaŭmo de l' tagoj, La (1). (1947) Boris Vian (1920-59). El la franca trad. Claude Longue Epée. Paris: Unuiĝo Franca por E-o, 2000. 80p. 21cm. "La plej korŝira el ĉiuj nuntempaj amromanoj" (R. Queneau), kva-zaŭ Schwartz-e lingvoluda fabelo moderna. Unua parto. € 6,00.

Tezoj pri islamismo kaj la vivo de la islama profeto. Mustar Abasi (1930). Red. Nino Vesela. Murree: Universala Islama E-Asocio, 2000. 26p. 30cm. La fondinto de Pakistana E-Asocio, religia sciulo, respondas al demandoj pri islamismo: ĉu fatalisma, minaca, perforta...? € 4,80.

KOMPAKTA DISKO

Sojle de la klara temp'. Kaj Tiel Plu. Donnevill: Vinilkosmo, 2000. 29 min. Popolmuziko el Katalunio kaj Okcitanio laŭ mezepoka stilo trubadura. € 15,00.



Infanoj, numismatoj, muzikŝatantoj... kaj aliaj trovos ion por si ĉi-monate.

Fervoja katastrofo kaj aliaj rakontoj. P. Neruda, B. Pasternak, Z. Heide k. a. Red. Erna kaj Henning Hauge. Trad. pluraj. Kiel: Esperanto-CD, 2000. 68p. ISBN 3 924409 07 2. 21cm. Antologieto de verkoj diversĝenraj, plejparte beletraj, kun rilato al fervojo. € 4,50.


Lotus-lanterno. El la ĉina trad. Yu Tao. Beijing: Ĉina E-Eldonejo, 2000. 112p. ISBN 7 5052 0435. 23cm. Ĉiupaĝe plenkolora bildlibro. Luksa eldono. Malnova ĉina mito en moderna stilo desegnofilmeca. € 9,00.

Mamutido Miĉjo. *Legolibro por komen-*

NIA KATALOGO EN INTERRETO!

Dank' al la kompetenta volontula laboro de Michiel Meeuwissen, kompleta katalogo de ĉiaj varoj vendataj de la Libroservo de UEA konsultebblas nun ĉe www.uea.org/katalogo. Kun 4100 titoloj la sortimento estas senkompare la plej granda en Esperantujo. Eblas serĉi librojn laŭ kategorio, titolo, aŭtoro, tradukinto aŭ traduklingvo. Facilas elekti la deziratajn varojn, kompili mendon kaj sendi ĝin al la Libroservo de UEA, kiu tuj plenumos ĝin.

La katalogo estas regule aktualigata, dum la libroforma katalogo, aperonta en oktobro, ne-eviteble iom post iom malaktualiĝos.



KATOLIKOJ: "Nova latino"

Certe pli ol mil homoj vizitis la informstandon starigitan de Internacia Katolika Unuiĝo E-ista kun Germana E-Junularo kaj Hamburga E-Societo en la 94-a Germana Katolika Foiro (31 maj. - 4 jun., Hamburgo). Sub la slogano "Esperanto — kompreniĝo por nova jarmilo" estis disdonitaj miloj da informiloj, lotumitaj ĉ. 200 senpagaj E-kursoj, kaj venditaj pli da Asterikoj ol da Biblio E-lingvaj. Ulrich Matthias, aŭtoro de la libro *Esperanto, das neue Latein der Kirche* (vidu p. 132), kaptis la okazon donaci ĝin al Viviane Reding, EU-komisionanino pri eduko kaj kulturo, kaj al Kurt Biedenkopf, saksia ĉefministro. Ambaŭ politikistoj ĉeestis en la

forumo "Ĉu Eŭropo survojas al unueco? Al kia unueco?", en kiu kardinalo Miloslav Vlk, konata favoranto de Esperanto, deklaris: "Ni eŭropanoj bezonas novan lingvon (...), la lingvon de la amo." (U. Matthias)

MCDONALD'S amas Esperante

En Brazilo, ĉirkaŭ la "tago de la amindumantoj" (12 junio), la



paperaĵoj plet-tukoj de McDonald's estis ornamitaj per amdeklaroj en diversaj lingvoj. Inter la 24 frazoj en la tria loko troviĝas "Mi amas vin!", dirata de paro hipie vestita. Anstataŭ landnomo legiĝas "Esperanto", kun flankaj klarigoj et-litera pri nia lingvo. (R. Resende)

RUSLANDO: La dutrionulo

En 1999 aperis en Ruslando almenaŭ 129 artikoloj rilataj al E-o, el kiuj ne malpli ol 84 de Viktor Kudrjavcev. (*La Ondo de E-o*)

TOGOLANDO: Vendreda radio

Laŭ kontrakto de Unuiĝo Togolanda por Esperanto kun la radiostacio Delta Santé de la urbo Aného, ekde 9 jun. e-istoj informas en ĉiuvendreda elsendo (17.30-18.30) pri Esperanto kaj pri la landa movado.

Gratulvortoj sendeblas al simpla adreso: Radio-Télévision, Delta Santé, Aného, Togolando. (Gbeglo K.)

VATIKANO: Pilgrim-programo

La 3-an de apr. Radio Jubilæum, speciala MF-kanalo de Radio Vatikana por jubileaj pilgrimuloj, prezentis, kadre de junulara elsendo, unuhoran programon angle-france-itale trilingvan, kiu favore informis pri Esperanto kaj alvokis ĝin lerni. (*Espero Katolika*)

BRAZILLO: FIERE KAJ SOLIDARECE

En la 4-a Parado de Geja Fiero en San-Paŭlo, la 25-an de junio, esperantistoj portis slogan-rubandon kun la frazo "Esperanto, Lingvo Internacia, unuiganta la komunumon G.L.S. (= gejoj, lesboj kaj simpatiantoj)".

Solidarece partoprenis la centmil-kapan eventon maldekstraj politikaj partioj, anarkiistoj, zapatistoj ktp.



Ambaŭ fotoj kompleze de João Manoel Aguilera Jr.

Laŭ nia informinto, UEA-delegito João Manoel Aguilera Jr., "ni esperantistoj devas ofte partopreni publikajn pacajn manifestaciojn, por ke la homoj sciu ke ankaŭ ni ne estas fremdaj al la homaj rajtoj, al la defendo de malplimultoj, kaj ĉefe [...] la Homaj Lingvaj Rajtoj".



ITALIO: Nova E-centro

Malnova membrino de E-Centro de Torino, Ada Bessone, donacis loĝejon al Itala E-Federacio. La prezidanto de IEF, Giordano Formizzi, akceptis la donacon antaŭ notario la 17-an de majo. La adreso de la nova Esperanto-Centro Torino, kiu estos ekipita per ĉio necesa por la organiza laboro, estas: Corso Unione Sovietica 215, IT-10134 Torino. (Nova Sento, Ret-Info)

JAPANIO: Sinteze kaj Uneske

En japanaj publikaj lernejoj oni enkondukas en 2003 "sintezajn lecionojn" ekster la kutima lecionaro, ekz. pri internacia komprenigado kaj ekologio. Tiajn lecionojn rajtos doni ne nur profesiaj instruistoj. Prepare al tio, 22 e-istoj kunsidis januare en la oficejo de Japana E-Instituto (JEI). Japanlingva broŝuro kun planoj de "sintezaj lecionoj" enhavis sperton de leciono donita de KIKUSIMA Kazuko (Krizantemo) pri Bosnio. (La Revuo Orienta)

Vigliĝis la rilatoj inter JEI kaj la Nacia Federacio de Unesko-Asocioj en Japanio, post vizito

de Kep Enderby al ĉi ties oficejo lastan oktobron (vidu dec., '99, p. 209). Ĝia direktoro, OKADA Sigeru, reciprokis la viziton ĉe la JEI-oficejo, kie li interesiĝis i.a. pri la libroserio "Oriento-Okcidento", kiu aperadas sub UEA-aŭspicio kontribue al la Unesko-programo por Reciproka Studo kaj Aprezado de Kulturoj. (JEI Informas)

KAMERUNIO: Asocio ree vigla

Dank' al klopodoj de e-istoj en la ĉefurbo Douala, lastatempe revigliĝis Asocio pri Esperanto en Kamerunio. La 21-an de majo 14-homa kunveno unuanime elektis i.a. honoran prezidanton Jean-Marie Mboge Mbele, prezidanton Jean-Michel Balaga kaj vicprezidanton Victor Nto-Nto. (Gbeglo K.)

POLLANDO: Nemovadece

"Nemovada kongreso" nomis Aleksander Korjenkov en *La Ondo de Esperanto* la 30-an Tutpolandanan E-Kongreson (28 apr. - 3 majo, Krakovo), ĉar pri la internaj aferoj de Pola E-Asocio delegitoj de la asociaj filioj decidis en aparta kunveno. Sepdeko da kongresanoj ĝuis ampleksan programon kulturen, klerigan kaj ekskursan, kun i.a. unuaktoraj dramoj de Jerzy Fornal (*Arlekeno* de Janusz Korczak) kaj Jadwiga Gibczyńska (*Signaloj* de Karol Wojtyła kaj *La Falanto* de Sławomir Mrożek).

NEDERLANDO: Reinaŭguro

Sur la turisme populara insulo Texel en 1935 la e-ista masonisto Siem de Waal starigis Esperanto-monumenton, kies gravajn ornamajn partojn insulanoj kaŝis vivoriske dum la dua mondmilito. Post funda riparo kaj purigo, tiu ZEO (Zamenhof/Esperanto-objekto) estis reinaŭgurita, la 17-an de junio, de Hans ten Hagen kaj Ronald Bijtenhoorn, estraranoj de la landa asocio Esperanto Nederland. La historiisto Hari de Graaf rakontis junaĝajn rememorojn pri E-o kaj la monumento, kaj la publiko povis ĉeesti publikan lingvolecionon de Atilio Orellana Rojas.

Post kiam la 3-an de majo la loka ĵurnalo *De Texelse Courant* kritikis Esperanton kiel eksmodaĵon, alvoko de Esperanto Nederland venigis lavangon da mesaĝoj el ĉiuj mondpartoj. La gazeto, doninta atenton al la reinaŭguro, konfesis sian surprizon pri la vivanteco de E-o kaj speciale menciis anglalingvan mesaĝon el Adelajdo, laŭ kiu la angla malplej taŭgas en la rolo de mondlingvo. (R. Bossong, Ret-Info, Esperanto Nederland)



El Monumento pri Esperanto



BROZOVSKY: Ĝis, Japanio

La 3-an de julio Joel Brozovsky (47-jara), dumviva membro de UEA, forlasis Japanion post 12-jara laborado ĉe Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto en la urbo Kameoka. Li ekdeĵoris en Kalifornio kiel oficisto de la

usona landa asocio ELNA, kies oficeja direktoro Miko Sloper ĵus ĝisrevidis sian postenon, favore al studoj pri filozofio kaj sanskrito. Brozovsky kolegos al Ionel Oneț, konstantulo en la CO de ELNA.

KURISU 90-jara

Honora Membro de UEA, esperantisto ekde 1930, fakulo pri la ĉefaj lingvo kaj literaturo, KURISU Kei fariĝis 90-jara la 18-an de julio. Li estas interalie konata kiel japaniginto de libroj kiel *La danĝera lingvo* de Ulrich

Lins kaj *Tempesto super Akonkagvo* de Tibor Sekelj.

RÖLLINGER 95-jara

Hugo Röllinger, komisiito de UEA pri Zamenhof/Esperanto-Objektoj kaj aŭtoro de la tiutema furoraĵo *Monumente pri Esperanto*, iĝas 95-jara la 1-an de aŭgusto.



ĜUSTIGO

La artikoloj "La gravito-sistemo de lingvoj" kaj "Dek lingvoj mortas ĉiujare" (jun., p. 102-103) venas el la n-ro apr. 2000 de la revuo *The Unesco Courier / Le Courier de l'Unesco*, ne el UNESCO Sources.

RET-INFO Retpoŝta Esperanto-novaĵservo
<http://www.esperanto.hu> ret-info@esperanto.org



ASTRONOMIO: Al Kanarioj

Astronomia E-Klubo, "koncipita en januaro, naskiĝinta en februaro", okazigos siajn unuajn du kunvenojn en Tel-Avivo dum la UK, trian kunvenon ĉe Kvinpetalo dum astronomia staĝo (1-5 sep., vidu "Kalendaro", p. 131) kaj jam konsideras planon por kvara kunveno en la Kanariaj Insuloj. (J. Rapley)

KOMERCO: IKEF-rekordo

Rekorde, en 1999 aliĝis 25 novaj anoj al Internacia Komercakaj Ekonomia Fakgrupo. Tiel la IKEF-membraro kreskis de 136 fine de 1998 al 149 fine de 1999, inter kiuj 7 dumvivaj. (La Merkato)

IKEF reaperigis *Economie — Finance — Monnaie*, Esperantan suplementon al terminaro de la Eŭropa Komisiono, kun 1150 terminoj en E-o, la franca kaj la angla, plus indekso. (Ret-Info)

MIKOLOGIO: Fungan kreskon!

Mikologia Klubo Internacia (Giorgio Bronzetti, Via A. Moro

37, IT-66013 Chieti, Italio; mikoklubo@infinito.it) estos fondita dum la mikologia seminario en Poprad (Slovakio) de 7 ĝis 10 septembro. MKI celas kunlaborigi ankaŭ fung-amikojn neesperantistajn. La unua propra aranĝo okazos venontjare. (Ret-info)

TURISMO: MT 30-jara


En Bydgoszcz (Pollando) festeno kaj malfermo de plilarĝigita oficejo markis, la 10-an de junio, la 30-jariĝon de la Esperanta agentejo Monda Turismo. Krom la kutimaj aranĝoj, kiel rondvojaĝoj kaj karavanoj al E-eventoj, MT funkciigas de pluraj jaroj, kunlabore kun Akademio Internacia de la Sciencoj, supergradan internacian studumon pri kulturo kaj turismo. Monda Turismo: str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz; ☎/✉ +48/52/341-57-44; andreo@rubikon.net.pl. (MT)

Ĝuste en Bydgoszcz gastis la 17-a Studsesio de AIS (29 apr. - 7 majo), kiu ricevis gratul-salutojn de Danuta Wałęsa, la edzino de la pola eksprezidento, kaj de Angela Merker, germana ministro pri virinaj aferoj kaj prezidantino de la partio CDU. (Trampo)

INTERLINGVISTIKO: Studu en la internacia kurso de Poznań

Universitato Adam Mickiewicz anoncas 3-jaran eksteran postdiploman studadon pri interlingvistiko. La unua studjaro startis en la vintra semestro de la studjaro 1998/99, kaj eblas aliĝi ankaŭ por 2000/2001. La kurso okazas sub la gvido de d-rino Ilona Koutny, membro de la Akademio de Esperanto. Prelegantoj estas i.a. prof. M. Duc Goninaz, H. Tonkin kaj J. Wells, d-roj V. Barandovská-Frank, Z. Galor, K. Smidéliusz kaj Blazio Vaha, krome L. Ligęza kaj I. Ertl.

István Ertl instruas en Poznań.



La studoj konsistas el enkonduko al ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, el internacia kaj interkultura komunikado, ili traktos planlingvojn, gramatikon, literaturon, kulturon kaj E-historion.

Surloka kurso (sesio) okazos unufoje en semestro (en septembro kaj februaro). La studentoj pretigos diplomlaboraĵon kaj post la fina ekzameno ricevos atestilon pri Interlingvistikaj Studoj.

Eblas aliĝi el la tuta mondo ĝis la 15-a de aŭgusto 2000.

Postulo: fino de mezgrada lernejo (kun abiturienta ekzameno aŭ egalvalora) kaj bona E-scio. Kotizo por unu semestro: 400 USD; por nepagipovaj landoj 90 USD. Informoj: I. Koutny, Lingvistika Instituto de UAM, ul. Międzychodzka 3-5, PL-60-371 Poznań, ☎/✉ +48/61/861-85-72 (sekretariejo); ikoutny@amu.edu.pl.

Oficiala informilo

PATRONOJ DE TEJO 2000

Belgio: Antoine J. Mechelynck. Francio: Paul Samain. Germanio: Ian C. Jackson. Italio: Carlo Bourlot. Japanio: Itō Hidetada. Korea Resp.: Choi Yun-huy.

SOCIETO ZAMENHOF 2000

Belgio: Michael Cwik; Jean P. Bovy. Germanio: Ian C. Jackson; Judith Jackson; Patrick E. Jackson; Robin Jackson. Korea Resp.: Choi Yun-huy. Nederlando: A.J. Bakker-ten Hagen; Catrien Bossong-Singer; Hans Bakker; Joaquim Calado.

DONACOJ 2000 (EUR)

ĝis la 31-a de majo

Asocia Kapitalo: Heredajo A. van Dam-Stoppelberg 226,89. Sumo ĉi-jara: 226,89.

Fondaĵo Afriko: Anonime 3630,24. Belgio: M. Haesebeyt 24,79. Britio: B. W. G. Phillips 32,94. Nederlando: Fam. Bossong 26,63; F. D. van Zoest 11,35. Svedio: J. Hammarberg 48,64. Sumo ĉi-jara 5230,21.

Fondaĵo Ameriko: Brazilo: Brazila E-Ligo 660,43; S. S. Ledon 55,04; J. Rezende Piton 110,07. Meksiko: J. Rosillo 60,00. Svedio: B. Andreasson 60,80; J. Hammarberg 24,32. Sumo ĉi-jara: 1697,37.

Fondaĵo Azio: Germanio: C. Führer 50,00. Japanio: S. Hayasi 19,89; Y. Misawa 39,78; S. Aikawa 40,94; T. Oura 102,36. Sumo ĉi-jara: 3747,91.

Fondaĵo Canuto: Britio: G. B. Dorow 23,41. Francio: S. Ardouin 30,49. Kostariko: Kostarika E-Asocio 48,00. Nederlando: T. van Huis-Staritsky 24,96; A. E. Moerbeek-Prins 45,38; F. D. van Zoest 11,35; A. J. Middelkoop 22,69. Svedio: Norrköpings E-klubb 74,18. Sumo ĉi-jara: 990,77.

Konto Espero: Britio: G. Emerson 8,23; L. Mee 50,00. Japanio: K. Hirose 32,82. Nederlando: T.

van Huis-Staritsky 49,91; F. D. van Zoest 11,35; W. T. J. Zeiss 11,34. Sumo ĉi-jara: 244,76.

Fondaĵo Grabowski: Usono: H. Janoski 109,41. Sumo ĉi-jara: 109,41.

Junulara Fondaĵo: Japanio: T. Huĝimoto 50,11. Nederlando: H. Jonkers 11,34. Svislando: Marion Bélisle 130,00. Sumo ĉi-jara 1727,99.

Fondaĵo Oficeja Ilaro: Britio: L. Mee 50,00. Sumo ĉi-jara 1195,79.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Svedio: A. Bergh 60,98. Sumo ĉi-jara: 343,04.

Ĝenerala Kaso: Britio: G. Blakey 9,88; B. Najbaro 31,48; A. Prent 26,35. Kanado: W. D. B. Hackett 17,39. Nederlando: F. D. van Zoest 11,35; R. Moerbeek 13,59; F. D. van Zoest 11,35. Svislando: B. Spalinger 1,90; W. Laederach 5,12; E. Walder 5,12. Usono: P. Ledeen 55,31. Sumo ĉi-jara: 1063,67.

Al ĉiuj tre koran dankon! NEA



Karnavale: Verko de la jaro

La abonantaro de *Literatura Foiro* referendum aljuĝis la premion "La Verko de la Jaro 1999" al Karnavale de Abel Montagut, alegorio pri memvola forlaso de onia lingvo (vidu rec. en apr. '99, p. 74). La kromaj kandidatoj por la premio, ĉi-foje rezervita al poezia libro, estis *Sur Parnaso* de Timothy Brian Carr kaj *Moskvaro* de rusa kvaropo. (HeKo)

Esperanto kvarone kreskis



81 jarojn aĝa, la dulingva monata organo de Japana Esperanto-Instituto, *La Revuo Orienta* (laŭ sia japana titolo: *Esperanto*), aperis en aprilo la 950-an fojon. Ekde oktobro 1999, ĝia amplekso estas 40 paĝoj (ĝis tiam 32). Ĝia alta kvalito estas dankebla i. a. al oficisto KITAGAWA Hisasi, iama longtempa volontulo ĉe UEA, kiu ĵus forlasis la oficejon de JEI post 15 jaroj da deĵoro. (JEI Informas)

Britoj legos rusan revuon

En junio *La Ondo de Esperanto* informis ke ĉi-somere ĝi havos plej multajn legantojn ne en siaj fortaj abonlandoj Pollando kaj Ruslando, sed en Britio. Laŭ interkonsento kun Esperanto-Asocio de Britio, tri sinsekvaj kajeroj de *La Ondo* iros al kvincento da britaj esperantistoj, kiuj restis provizore senrevuaj pro krizo ĉe *La Brita Esperantisto*.

Hundo boas, Bojado vojas

Bojado estas multobligata gazeto por esperantistaj posedantoj kaj ŝatantoj de hundoj. Ĝi flegas bonajn rilatojn kun *Folioj de Kat-Amikaro* (vidu jun., p. 118). Kontaktu: Pavla Zemanová, U Starého Mlýna 18/16, CZ-10400 Uhřetíněves, Ĉeĥio.

Konsilioj al kongresigistoj



International Meetings News, la anglalingva informbulteno de Internacia Konferenca kaj Kongresa Asocio (ICCA, vidu nov. '99, p. 201), kovrilpaĝe intervjuis en junio la Konstantan Kongresan Sekretarion de UEA, Nikola Raŝić, kiu i.a. sugestis ke ICCA helpu kongres-organizantojn per stariĝo de takso-sistemo pri komparaj kvalitoj de kongresejoj.

Kiel statas PIV?

Pri la atendata nov-eldono de Plena Ilustrita Vortaro informas Michel Duc Goninaz en la junia numero de *Sennaciulo*: la "revizia laboro laŭ fakoj estas esence finita", la relegado kaj unua korekto atingis la literon R. Li preferas ne menciigi limdaton, sed certigas pri la "zorgo liveri kiel eble plej bonan verkon" kaj trankviligas "pri la baldaŭa atingo de la celo". Aliflanke, laŭ samloka komuniko, la Plenum-Komitato de SAT daŭre esperas ke eblos eldoni la vortaron ankoraŭ en la jaro 2000. Estis starigita fonduso por helpi la eldonon; kontribuoj bonvenas ankaŭ pere de la UEA-konto de SAT, "satx-s".

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifen de anoncoj vidu en la kolofono, sub la enhavtabelo.



ANONCETOJ

SONJA DORA MACGILL eniris la mondon bonsana en la 13a de junio (03.15h), je la ĝojo de panjo Soponyai Mária, paĉjo Stefan MacGill kaj fratinoj Karina kaj Hajnal.

ĈIAM KONSTANTE akceptas korespondo-proponojn kun japanoj. Skribu unuope al Japana Esperanto-Korespondo-Servo; ĉe KLEG, Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, 561-0802 Japanio.

NI DANKEGAS tiujn kiuj kondolencis nin pro la morto de niaj karaj gepatroj. Dio benu vin! Agim kaj Bahri Peraj, Albanio.

HELPUS EN LA ĈIUTAGA VIVO s-ro J. Šimkonis, Kovo 11-os 114-100, LT-3042 Kaunas, Litovio.

DEZIRAS KORESPONDI tutmonde univ. studento 26-jara pri ĉiuj temoj: Afshin Rasouli, 14 Homayune Lane, Sh. Rajai Str., 69156 Borujerd, Irano.

POR GAJE PAŜI EN LA NOVAN JARMILON, ni aranĝos letervesperon. Bv. sendi al ni belan bildkarton el via lando ĝis fino de novembro. Ĉiu sen-

dinto ricevos E-bildkarton de nia urbo, kaj ni balote elektos unu por invito al senpaga semajno en nia urbo. Anna Pištárová, Nové nám. 1746, CZ-560-02 Česká Třebová, Ĉeĥio.

GEEDZIĜIS LA 24-AN DE JUNIO Nataša Grigorjevskaja kaj Andrej Ananjin (□andreo@fnmail.com), internacie konataj E-aktivuloj kaj motoroj de la rusia E-movado. Gratulon kaj feliĉon!

KIU FAKA ARTISTO povus konstrui vitralojn? Petu la desegnon por fari vian prezon. TAKE-ESPERANTO 90, Rue du Tiefenbach, FR-68920 Wintzenheim, Francio; □+33/3/89-79-43-33; □100623.3022@compuserve.com.

ĈINA ESPERANTISTINO 42-jara, sana kaj bonkora, volas edziniĝi al eŭropa viro malpli ol 60-jara. Sino Xie Yuzhen, Huanshi-Zhonglu, Nankeng-dong 6 — 403, CN-510060 Guangzhou, Ĉinio.

DEZIRAS KORESPONDI tutmonde univ. studento 26-jara pri literaturo, kino, muziko, foto, komputado: Babak Rasouljan. P.O.B. 69135-165, Borujerd, Irano.

Alain Fournier

La granda Meaulnes

Fama priskribo de pura amo.

La sola verko de la aŭtoro, kiu mortis nur 27-jara.

El la franca trad. Roger Bernard. Rotterdam/La Laguna: UEA/J. Régulo, 1988/1975 (eldono/preso). 222p. 21cm. Belliteratura serio 32. Prezo: € 10,20.

Zuzanna ĆWIKLIŃSKA (1911-2000) forpasis la 24-an de januaro en Krakovo, kie ŝi multflanke kaj diversfunkcie aktivis ekde 1931. Ŝi instruis la lingvon kaj konstante kunlaboris kun *Pola Esperantisto*. En 1941 ŝi kun siaj gefratoj Stanisława kaj Władysław estis arestita pro kontraŭnazia kaj por-Esperanta agado: la fratoj lastmomente saviĝis pro la liberigo de la koncentrejo Ravensbrück, sed Władysław estis mortpafita en Aŭŝvico.

Sir E. Irvine GOULDING (1910-2000), emerita juĝisto, membro de UEA ekde 1943, forpasis la 13-an de januaro en Woking (Britio). Aktivulo de la iama Internacia E-Asocio de Juristoj, li ofte kontribuis al ties *Internacia Jura Revuo*. Lia filo estas Marrack Irvine Goulding, vic-ĝenerala sekretario de UN respondeca pri preventa diplomatio kaj pacmisioj tutmonde.

Hazel HOFF HEUSSER (1910-2000), dumviva membro, iama delegitino pri edukado, mortis la 14-an de majo en Fresno (Kalifornio).



Leksikono de aktivaj lapsoj de esperantistoj

Karl-Heinz HOFFMANN (1919-1999), delegito en Hamburgo pri blindulaj aferoj, mortis lastatempe. Li aktivis en la germana sekcio de Ligo Internacia de Blindaj E-istoj kaj redaktis la sekcian organon *Blinda Esperantisto*. Li membris en la LKK de la Hamburga UK (1974).

Maria HOONAKKER-EIKENHOUT (1907-1999), dumviva membro, antaŭe sekretario de la Harlema E-grupo, forpasis la 22-an de aŭgusto 1999.

Selma JÄRVINEN (1913-1999), dumjardekoj delegitino en Lauritsala (Finnlando), mortis la 8-an de novembro 1999 en Lappeenranta, kie ŝi estis la animo de la loka klubo.

Nedeljka SUBOTIĆ (1924-2000) mortis la 28-an de majo en Beogrado. E-isto de 1955, ŝi tuj aliĝis al UEA kaj ekservis kiel delegito pri instruado kaj turismo. Ŝi funkciis kiel sekretario de Jugoslavia E-Instituto, anis en la LKK de la Beograda UK (1973), gvidis kursojn kaj verkis originale kaj traduke. Ŝiaj poemoj aperis en la volumo *Reeĥoj* (1961), en la revuoj *La Progreso*, *La Suda Stelo* ktp, ŝiaj tradukoj prozaj kaj poeziaj en *Antologio de la serba parola literaturo* (1991) kaj *Antologio de la serba poezio* (1998).

Paul MORIN (1918-2000), multjara delegito kaj turisma fakdelegito en Bourges (Francio) kaj komitatano de Unuiĝo Franca por E-o, mortis la 16-an de junio. Dum 25 jaroj li prezidis la lokan klubon, gvidis multajn kursojn kaj havigis al sia urbo tri ZEO-jn.

Ildefonso M. NÚÑEZ BELTRÁN (1902-2000) forpasis en Cajamarca (Peruo) la 19-an de majo. Lerninte Esperanton en 1918, li propagandis la lingvon en Ekvadoro, Kolombio, Venezuelo kaj Peruo. Li fariĝis delegito laŭ letera instigo de Hector Hodler, kaj restis aktiva kiel tia ĝis alta aĝo.

Marcelina PALOMO (1911-2000), dumviva membro de Hispana Esperanto-Federacio, vidvino de Angel Figuerola (prezidinto de HEF, 1970-78), kiu aktivis en Madrido, mortis la 20-an de februaro.

Jan VERHEULE (1930-2000), delegito en Apeldoorn (Nederlando), kasisto kaj sekretario de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, redaktoro de ties *Esperanta Ligilo*, mortis la 21-an de junio.



UEA / F. L. Veurhey

Frits ZEILER (1915-2000) forpasis la 14-an de marto en Bergen (Nederlando). Aktivulo de Universala Ligo, membro de UEA ekde 1936 kaj jura fakdelegito dum longa tempo ekde la 30-aj jaroj, li mecenate subtenis multajn valorajn projektojn de UEA kaj de la landa asocio en Nederlando.

Władysław MIZIOŁEK, helpepiskopo, kiu forte subtenis la katolikan E-movadon, i.a. por la aprobo de la *Roma meslibro* E-lingva, mortis en Varsovio la 12-an de majo, 85-jara.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; ✉ +61-2-9555-9705; ☐ keponderby@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, financo): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ☐ corsetti@iteldad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ☐ lipari@esperanto.nu.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobříčovice, Ĉeĥio; ☎ +420-2-991-2201; ✉ +420-2-991-2126; ☐ chrdle@telecom.cz.

Estrarano (Afrika agado, sporto): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17; ☐ esp.togo@cafe.tg.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen

55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ☐ kalle@esperanto.se.

Estrarano (kulturo, landa agado): s-ro Tacuo Huĝimoto, Kubota 31, Sakio-ku, Kyōto, 606-8266, Japanio; ☎/✉ +81-75-711-45-58; ☐ jasu-k@mac.email.ne.jp.

Observanto de TEJO: d-ro Sjoerd G. Bosga, Trädragargatan 27 D, SE-72337 Västerås, Svedio; ☎ +46/21/417-045; ☐ sjoerd@esperanto.se.

Observanto de ILEI: s-ro Stefan MacGill, Bethlen G. u. 2, HU-2030 Érd, Hungario; ☎ +36/23/364-198; ☐ Stefan.MacGill@galamb.net.

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KONTAKTO estas gazeto
por ĉiu kiu serĉas interesan
legadon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, tiel ke
KONTAKTO estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso atendas vin en
ĉiu numero de la revuo!
En 2000 **KONTAKTO** aperos
6-foje. Abonu rekte de UEA
aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFA 2000

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	39,67 guldenoj
Aŭstrio	250 ŝilingoj	Germanio	36 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	740 frankoj	Hispanio	2600 pesetoj	Pollando	9 eŭroj
Brazilo	9 eŭroj	Israelo	14 eŭroj	Portugalia	2900 eskudoj
Britio	13 eŭroj	Italio	36000 liroj	Svedio	165 kronoj
Danio	135 kronoj	Japanio	2300 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	110 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	20 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

Pionira vortaro por mondlingvo



KLARA VORTARO ESPERANTA-ARABA.
Georgo Abraham. Rotterdam: UEA, 1998.
308p. ISBN 92 9017 056 5. 22cm.
Prezo: €13,70.

"Grava helpilo por komencantoj kaj progresintoj"
(Hugh Martin)

La araba estis la sola oficiala lingvo de UN kiu ĝis nun malhavis ampleksan Esperanto-vortaron. Jen la unua paŝo por forigi tiun mankon.

Klara vortaro Esperanta-araba rezultas el pli ol 30-jara pionira laboro. Ĝi estas klara, ĉar ĝiaj 15000 kapvortoj estas plejparte aranĝitaj laŭ la alfabeto ordo de la vortoj anstataŭ tiu de la radikoj.

Kvindek jarojn post la fondiĝo de la Kastelo ni apelacias por subteno al la
JUBILEA LIBRO DE GRÉVILLE
aperonta en la jaro 2002.

Malfermiĝis fonduso ĉe UEA "jugr-g" por akcepti viajn kontribuojn, sendebaj ankaŭ al la speciala poŝteko-konto de la kompilanto «Mme LLOANCY Marie-Thérèse — Memorlibro» 5 908 07 A Bordeaux. Kiu donacos minimume €50 ricevos senpagan ekzempleron de la bonkvalita, plurloke kolore ilustrita libro.

**La Jarlibro akompanos vin tra tuta
jaro... donu taŭgan veston al ĝi!**

UEA ofertas elegantan bonkvalitan platan kromkovrilon por via Jarlibro. Mendu ĝin kontraŭ €0,80 (+ afranko kaj, ene de EU, imposto de 17,5%). Triona rabato ekde 3 ekz.



Eltendu el via Jarlibro la lastan paĝon



**10%
RABATO!**

kaj sendu ĝin al la Libroservo de UEA!
Ĝi ja estas kupono, kiu rajtigas vin
ĝis la 31-a de dec. 2000 mendi kion
ajn kaj kiom ajn kun 10%-a rabato!



SANO EL SOCIA VIDPUNKTO



Kiel diversaj kulturoj komprenas sanon kaj malsanon? Kio kaŭzis famajn amasmalsanojn kiel malario, variolo, sifiliso kaj aidoso, kaj kiajn sekvojn ili havis? Kiel rolas narkotajoj en la socio kaj ĉu popolaj kuracmetodoj plu valoras? Jen temoj el la tria libro de la Unesko-serio de UEA.

"La kreskanta maladekvateco de ortodoksaj taksoj de sanprizorgo shajnas indiki bezonon por grandaj shanghoj en individua, socia, ekonomia kaj media interrilatoj" (p.39)

KULTURO KAJ SANO. Mervyn Claxton. Trad. Helga Rapley. Rotterdam: UEA, 1999. 42p. ISBN 92 9017 060 3. 21cm. Prezo: €5,40.

OMAĜE AL AULD KAJ BOULTON

En 1999 William Auld kaj Marjorie Boulton festis sian 75-an datrevenon. Okaze de la jubileo UEA donacis al ili festlibron, en kiu pluraj kontribuantoj prilumas ilian verkistan karieron kaj analizas iliajn verkojn. Aliaj eseoj traktas aktualajn temojn de la movada kaj kultura vivo de Esperantujo.



Kontribuis V. Benczik, G. Berveling, W. Bormann, J. Camacho, P. Daŝgupto, S. Fiedler, P. Gubbins, T. Huĝimoto, R. Jaderstrom, E. de Kock, A. Korjenkov, Laŭlum, Mao Zifu, G. Mattos, S. Maul, A. Montagut, S. Pokrovskij, B. Ragnarsson, M. de Seabra, G. Silber, H. Tonkin, L. Trifonĉovski kaj J. Wells. Kun la bibliografioj de Auld kaj Boulton fare de C. Cimpă.

LINGVA ARTO. Jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton. Red. Vilmos Benczik. Rotterdam: UEA, 1999. ISBN 92-9017-064-6. 5+217p. 21cm. Prezo: €16,50.


NOVAĴOJ

de la eldona fakto
de UEA

ENKONDUKO AL DEMOKRATIO

KIO ESTAS DEMOKRATIO? 80 demandoj kaj respondoj.
David Beetham kaj Kevin Boyle. Ilus. Plantu. El la
angla trad. Geoffrey Sutton. Rotterdam: UEA, 2000.
143p. ISBN 92 9017 066 2. 21cm. Prezo: EUR 9,90.

Du elstaraj britaj fakuloj klarigas en ĉi tiu gvidilo de Unesko okdek el la plej premaj demandoj pri la esenco, celoj kaj funkciado de demokratio. La demandoj estas aranĝitaj en ses sekcioj: bazaj konceptoj kaj principoj; liberaj kaj justaj elektoj; malferma kaj respondeca regado; rajtoj de unuopuloj kaj ilia defendado; demokratia socio; la estonteco de demokratio. Bonega kaj klara enkonduko en la plej gravan politikan koncepton, uzebla kiel lernolibro aŭ baza konsultlibro. Bela grafika vesto kun spritaj ilustraĵoj de Plantu, ĉefdesegnisto de la franca ĵurnalo *Le Monde*.



RESPONDOJ PRI RASISMO



PAĈJO, KIO ESTAS RASISMO?
Tahar Ben Jelloun (1944). El la
franca trad. Armela LeQuint kaj
Jak Le Puil. Rotterdam: UEA,
1999. 52p. ISBN 92 9017 063 8.
19cm. Prezo: € 6,50.

"Bela libreto pri komplika temo. Dekjarulo povas kompreni la enhavon kaj plenkreskulo legas ĝin kun intereso. La originalo de la maroka Goncourt-laŭreato fariĝis furoraĵo en Francio. Aĉetu kaj legu ĝin. Diskutu ĝin en via Esperanto-klubo, kun viaj infanoj kaj kun viaj amikoj." (Leif Nordenstorm)

POR FACILE TROVI ALIAN VORTON

ESPERANTAJ SINONIMOJ.
Jaan Ojalo (1914). Rotterdam:
UEA, 1999 (3-a, korektita eld.).
96p. ISBN 92 9017 067 0.
19cm. Prezo: € 7,20.

Ofte oni sentas la bezonon vigligi kaj variigi sian stilon per uzo de sinonimoj aŭ de preskaŭ sinonimoj. Por helpi en tio, la estona aŭtoro kompilis tiun ĉi vortaron. Bazita sur Plena Ilustrita Vortaro, ĝi enhavas 1925 kapvortojn kaj 5500-vortan indekson. Taŭga fonto por ĉiu kiu volas pliriĉigi sian vortostokon.



KAJ PLIE...

LA LABORO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO POR PLI PACA MONDO. Ulrich Lins. 12p. Prezo: € 2,10.

THE WORK OF THE UNIVERSAL ESPERANTO ASSOCIATION FOR A MORE PEACEFUL WORLD. U. Lins. 12p. Prezo: € 2,10.

TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ. DE SAMA TITOLO ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Telefona: +31 10 436 1044

Telefakso: +31 10 436 1751

Retpoŝto: <uea@inter.nl.net>